Jam ĝermas iaj revoj Krestanofaj:
De ŝildaro fruktoporta kerno,
Kiu diskreskos en ĉi-Romo vorta
Kaj min preĝam anoncos sennorta.

Sed serĉaj planken! Ĉi rimado proza
Fine jam vekas indignon ekkon:
Antaŭ mi staras Mater Dolorosa —
La esperanta Muzo en aŭroro,
Kiu riproĉas, ke ŝia almoza
Kaj ĉi fonita frukto de mia fervoro.
Ne gloron faris por mia Parnaso.
Sed ... la makulajn sur ŝia atlaso.

Mi do pentante pro ŝia ofendo
Pro la indigno novan plumon prenas.
Por malhonora respondante mendo,
Ŝian ventraĉon vulgaran malbenas.

Kaj nun poeto, luma mia tendo
Sur alta monto staras, kvaw venes
Ne de la ventro bestaj ekdeziroj,
Sed de spirito anĝelaj sopiroj.

Mi do deziras, ke Kroniko via
Ne estu tola, malpura stratejo,
Sed Panteono de penso radia,
Arĥiv' azilo de Esperantujo,
Poste eĉ trovu sur paĝoj ĝia
Akcepton nia matura patrujo,
Kies malindaj filoj sen hejmdomo
Skribas poemojn en fremd' idiomo.

Kiam post jaroj tiuj ĉi kajeroj
Multaj jam estos – ni, maljunaj avoj,
Plenumano ĉerpos el font' de esperoj:
Ni vidos, kiel idealaj revoj
Kaj la junulaj maltimemaj veroj
Sur niaj vangoj, sulkitaj per kavoj,
Rozojn de tela ekrido diversos,
Kiel en ĉies brusto koro tremos.

Do ĝis alvenos lia bela horo,
Mi, kiel ŝaplopasio de la Kvora,
Benos lin dume el sincera koro,
Ke la spirito lia estu klara
Kiel, venante, purpura aŭroro,
Ke en li flamu ĉiu ver' homara.
Kaj ke post fino de sia viv-peno
Fier' li estu nia, ne ĉagreno.

Brunulo.

Szczypiorno, 4 de marto 1913.

Fragmentoj el notlibro.

al Sinjorino W. P. T.

En ĝardeno.

Mi sidas sur benko en urba ĝardeno.

Majestaj arboj Ĉirkaŭas min, ombrante per foliaro. Birdoj sur iliaj branĉoj gaje trilas.

En ĝardeno ludas petolemaj infanoj. Malgrandeta knabino, blanke vestita, alkuris min kaj per larĝe malfermitaj okuloj rigardas. Kiel ian misteran nekonatan beston.

Naivulineto, ne timu!

Ŝi ekridetis kaj kvazaŭ malantaŭen, al sia vartistino, sed survoje – ho, malfeliĉo! – ŝi falis kaj plende ploris anstataŭ ridi...

Rapide pasas infanaj doloroj: post unu momento ŝi jam ree ridas, ree saltas ...

Ha, se mi povus tiel rapide forgesi mian doloron, forgesi la turmentojn de koro kaj esti feliĉa kaj senzorga, kiel infano!...

. . . .

Mi ne scias, kial venas subite al mi malgajaj pensoj, okulojn plenigas de larmoj kaj koron premas tiu malproksima sopiro, kiu sin trudas ĉiam, kiu ĝi per tuta ĝojo, kiu sen fino, sen loko, nur povas senti tiun ĉi internan premadon ...

Ŝi!...

Ĉiam kaj ĉie Ŝi!...

Ĉiuj ĝojoj, ĉiuj doloroj pro Ŝi...

Bela, bona, alloga, senĉese malproksima kaj samtempe senĉese proksima de mi ...

Karese delikata vizaĝo, kun okuloj verdaj kiel mar' dum la horo de sunsubiro ...

Sinjorino! Ploro, aromanta de malproksime, sono de mia vivo, feliĉo de mia ekzistado. Kial tiel turmentas min pensoj pri Vi?

Kial mi suferas, sopiras kaj ploras, pri Vi pensante?...

Kial? Pro kio?...

Kiu respondos?...

Mian amon, unuan modestan amon mi alportis, Sinjorino, al viaj piedoj...

Vi rigardis min kiel knabon, sed mi tiam suferis, ke mi min sentas esti matura viro...

Sinjorino!

Ĉiam kaj ĉie Vi estas kun mi, ĉiam delogas min Via gracio. Kvazaŭ diafana figuro, okuloj verdaj enpenetras mian animon kaj brulegaj per siaj radioj mian malfeliĉan adorantan koron...

Senĉese malproksima kaj samtempe senĉese proksima, Vi ĉiam estas kun mi...

. . . .

Venteto skuas la branĉojn de l' arboj, strata bruo mallaŭte alfluas al oreloj, al suno ĵetas tra foliaro sorĉajn [mondojn] ombrojn sur vojetojn de ĝardeno.

Tago baldaŭ finiĝos.

Baldaŭ la krepusko kovros per sia vualo la lutan o urbon kaj ĉe la unua lumo vendaneas blankaj mistera fantomoj...

Kun nova forto turmentos min malĝojaj pensoj.

Ho, kiam do venos fino?

Ĉu nur post morto?...

Malfeliĉa koro!...

Homo, perdinta vojon.

Mi estas simila al homo, perdinta vojon en densa, netrairebla arbaro...

Li jetas sin de unu flanko al alia, li serĉas eliron, li avide rigardas, ĉu ne ekbrilos ie lumeto... sed vana estas la atendo:

Nek eliro, nek lumo...

Silentas arbaro... minace silentas...

Kaj sajnas al terigita vaganto, kvazaŭ ĉirkaŭas de ĉiuj flankoj misteraj, timigaj fantomoj, fantomoj de morto.

Ili ĉirkaŭas kaj ridas per sufokita morema rido.

Ili scias, ke baldaŭ lastaj fortoj forlasos la homon, kaj ke li falos ilia akiro...

Tiu arbaro estas vivo, fantomoj - morto...

Miaj Kantoj.

Se oni demandus min, porkio mi verkas kaj kion mi volas aliigi per miaj kantoj, mi ne scius, kion respondi...

Demandu la birdon, porkio ĝi kantas de la matenigo ĝis la malfrua vespero.

Demandu la floron, porkio ĝi disverŝas aromon...

Ĉu povus mi vivi sen kantoj?...

Ĉu ili estas mia feliĉo...

Per ili mi kreis por mi belan mondon, mondon de revoj, kiu estas senfine malproksima de via mizera reala mondo...

Per kantoj mi vivas, sen ili mi pereus...

Miaj kantoj estas mi mem...

*

* *

Sinjorino! Mian vivon mi fordonis al Vi. Ĝi estas en kantoj, al Vi dediĉitaj...

Georgo Deŝkin.

„Lingvo Internacia", marto, 1913.

Hej vi, revoj miaj.

de Leop. Zelenay.

Hej vi, mia revaro aŭrora,
Sorĉiganta superan animon!
Pens' flugantaj en spacon senliman,
Ardiganta per forto la koron!
Nun, al brul' estingita simile
Jam nenio el vi ardas brile.

Hej vi, mia revaro ĉiela,
Hej vi, kor' mia, aglo fiera.
Vi foriris. Nur tombo mistera
Kaj nur vund' restis sange malbela.
Min nur premis de l' tombaj la miĉo,
Malproksime kaj vi, kaj feliĉo.

Nokt' malgaja, silenta malklara
Nun en mia animo ekregas,
En kor' mia nenio brulegas,
Di' forestas en ĝia altaro!
Kie estas vi, revoj aŭroraj,

Miaj sanktaj vi, dolĉaj, memoraj?

Min porĉiam temp' tiu forlasis,
Kiam en dolĉa hor' de vespero
Ni flugadis kun vi en etero ...
Ne revenos moment', kiu pasis, —
Kiam kovris nin tombe la niĉo,
Malproksime kaj vi, kaj feliĉo.

El la pola lingvo tradukis
Czesław Kozłowski.

„Juna Esperantisto"
marto
1913.

En la sama ankoraŭ estos presitaj:

„Ŝtona Dio"
de H. Zbierzchowski, tradukis A. Zeleny
kaj
„Mia kord' liuta"
de Adolf Zelenay.

Ĵdona Dio.

de H. Zbierzchowski.

En roka la kaverni', pro dolorego muta,
Pasigas mi, Di' Ĵdona, lastgojn de l'ekzisto;
Komencis min pensì greka kaj konsupiro tuta
Kaj lumo venis mi el mi de l' majstri-skulptisto.

Hodiaŭ min katenas malseka la Kaverno,
Nigriĝis blanka korp' de malfeliĉa Dio;
Trabatis min al roki ferstango tra l'inferno,
Kaj putras ĉe pied' velkinta la folio.

Memores mi – bruego, fremaj ventaletkaj,
Mi pensis pri la lum' revanta en medito,
Dum bone, ho, la sort' – defalis al mi brakoj!

De l'iam mortes mia en duboceanoj, –
Ho, korpo mia, korp' per muskl' kaj ŝimi' kovrita,
Ho, manoj, malfeliĉaj kaj disrompitaj manoj!

tradukis Adolf Zeleny.

Karto de Leska.

4 aprilo.

Kara sinjoro!

Volu pardoni, ke mi ne povis akcepti vin, sed en ĉi tiu momento mi decidiĝis forveturi plifrue kaj tial devis rezigni jam de tiu agrablaĵo, kiel ekkono de tiu aristokrata mezko. Varsovion mi revenis feliĉe kaj jam dediĉiĝas la ĉiutagajn devojn de homo praktika. Mi ree intencas rekomenci poezii, sed mankas diversaj vortoj. Se dum tiuj ĉi festoj mia kapo inspiros, do mi skribos al vi plivastan leteron. Salutojn por Bruno.

Via Leska.

Karto al Leska.

6 aprilo.

Simile kara ĉimpanzo!

Mi tre malĝojas, aŭdante, ke vin denove surfalis unu el la plej nekuraceblaj malsanoj — la „poeziado". Kiel kuracisto-specialisto de tiuspecaj malsanoj, mi, malhelpita per mia laka nuntempa paciento veturi al vi — distance volas resanigi vin per la plej efikaj medikamentoj — la vortaroj de Grabowski kaj Czmonowski, uzotaj tage aŭ nokte, tute laŭ plaĉo. Mi esperas, ke tiuj kuraciloj

faros sian devon kaj, ke, post kelka tempo vin atingos Rhodes kaj Rabe – alestos vin jam en plena sano, kion donu Dio! – Ankoraŭ mi devas aldoni, ke la fotografaĵojn mi sendis antaŭ semajno al Baĉo, kiu ilin jam estas ilin al vi enmanigonta.

Dume ĝis!

Pajfo.

Letero de Ĉeska.

7 de aprilo.

Via moŝto Elefanto la Granda!

Vian mildan leteron mi bone ricevis kaj ĉe l' antaŭvespera teo en kombejo mi analizis ĉiun ĝian vorton. Mi faris kun ĝi medicinan esploron kaj montriĝis, ke ĝi enhavas jam embriojn de flirto. Ĝenerale viaj spritaĵoj estas sekaj kiel vi mem kaj ne valoras unu rompitan duongroŝon – kiel vi mem. Mi ne volas vin havi unue ĉe mi, por fari al vi grandan honoron: vi ricevos de mi ambaŭ pomin vangfrapo kiel dankon por fotografaĵoj, je kiuj mi atendis du semajnojn.

Mi ne skribis al vi tuj post reveno ĉar dum tutaj du unuaj tagoj kaj noktoj mi kuŝis en brakoj de mia amatino kaj poste estis jam egale pli ĉu malpli frue sendi karton, kion mi jam faris.

Verŝajne por via kroniko mi ion skribos pri troĥeoj kaj jamboj.

Ĉeska.

Korto al Leska.

13 de aprilo.

Leska! — Kio okazas, ke vi kiel sfinkso silentas? Ĉu eble en amaj atakoj vi perdis tutan vian fortoŭ, ke eĉ la plumon ne povas movi!? He?? Mi maltrankviliĝas!

Via Pajpo.

Korto de Leska.

13 aprilo.

Kara Pajpo!

Kiel mi vidas, vi efektive ne ankoraŭ retrovis vin mem kaj ĉirkaŭita per ia malbona spirito vi perdiĝas vin. Kial vi neniom skribas? Ĉu vi volas, ke mi faru al viaj genoj kaj pelu de vi portonon pro tio, ke iam mi diris al vi leteron, ke vi estas infano, naivulo, nesaĝa aŭ io simila? De kiam vi fariĝis via aristokrato?

Eble do sendi al vi mian vizitkarton, do dum Pasko vi povus ~~de~~ havi duelon, elekton de armiloj mi donas al vi kiel al ofendita.

Kion vi opinias?

Leska.

<u>Baĉo:</u> Mi, kiel militano, estos rekomendanto de Leska, do gardu vin! Baĉo.

Karto al Leska

14 de aprilo.

Leska!

La duelon mi akceptas. Tro da ofendoj! La vizitkarto sekvas samvoje. Mia sekundanto – Brunulo. Pri armiloj decidos la sekundantoj. Loko de duelo: Bombejo sur loka tero. Tempo: pentekosto, unua tago, 3h pt.

Adiaŭ!

Fajfo.

Karto al Leska.

14 de aprilo.

Kara! – De Brunoro mi aŭdis, ke vi vizitis varsovian societon. Faru do vian devon – trankviligu mian scivolemon kaj dividu vin kun la impresoj – verse aŭ proze – des pli, ke vi jam iom pri „troĥeoj kaj jamboj" (supoz. Grabowski) anoncis. Mi atendas! Brunoro indignetas, ke „sinjora Leska" ne ankoraŭ skribis la promesitan leteron. Tuj do alplumiĝu! Al tiu heroo de niaj tempoj – la militano (!) Baĉo – faru ĉinan okulon. Li tenu antaŭ mi! Pro ordo volu diri al mi, ĉu ricevitaj estas la vortaroj de Grabowski, Cranowski kaj, fine, Kabe?

Fajfo.

Koro de Petalo.

Kievo, 29 majo.

Plej koregajn salutojn, bondezirojn sendas al:

Braun } Krimuloj (poetoj)
Fajfanto }

Rotem } profesoroj de Kaligrafio
Mamut } (nelegebluloj)

Damjano (taki Jan co lubi damy?)

Baĉo } [illegible] [illegible]
Brunulo } (pseudonimoj)

Kore ilin estimanta kaj ilian adreson scii dezireganta kaj kun granda doloro laŭ antaŭa adreso kartojn sendanta

Cz. Kozłowski

popeĉinto de Petaloj.

Respondoje-

Rim.:- Salute Koro, sendita la 24an el Lorencówka. Subskriboj: J. Braun, Fajfanto, Eska, Menero, Damjano, Baĉo, Brunulo.

Ĉu momentoj de enuo kreis (!)
Brunulo & Pajŝanto.

Leo Lozoff	Leo Zamenhof
Antonio Carpenius	Antoni Grabowski
Pastro Eslinger	Pastro Loesche
E. Publicat	Edmond Privat
Leo Schoenberg	Leo Belmont
M. Wernicki	M. Czerwinski
Napoleono Malaparte	Leon Rosenstock
Br. Kulski	Bronisław Kull
C. Caprinti	Czesław Kozłowski
G. Doskin	Georg Deŝkin
M. Méne	M. Ŝidlovskij
Dro A. Fuŝer	Dro A. Fiŝer
Dro Lydkier-Wade	Dro K. Bein
I. Ch. Krucanoff	Ivan Kreslanoff
St. Desperhof	St. Schulof
Mavro Pintis	Mavro Spitzer
H. Hodenleer	H. Hodler

Die Organisationsversammlung des neuen Lodzer Esperanto-Vereins. (Lodza esperanto societo). Eine Gruppe Stürmer und Dränger, denen Esperanto mehr als Tändelei und Modesache ist, veranstaltete gestern abend im Lokale des Lehrervereins an der Poludniowastraße Nr. 20 die Organisationsversammlung des neuen Esperanto-Vereins. Die Versammlung eröffnete Herr Gormann. Zum Vorsitzenden der Versammlung wurde Herr Redakteur Heinrich Zimmermann gewählt, der Herrn A. Alper und Frl. R. Tyber zu Assessoren und Herrn Ludwig Klotz zum Schriftführer ernannte. Der Vorsitzende Herr Zimmermann hält eine längere Ansprache über die Ziele und die Aufgaben der Esperanto-Bewegung, weist auf die mühsame Entwicklung jedes neuen Gedankens, jeder kulturellen Errungenschaft hin und fordert die Versammelten zur energischen Mitarbeit an der Verwirklichung des längst gehegten Träumes der Menschheit, zur Einführung einer zweiten Sprache für alle, einer gleichen für alle auf. Herr Schultz hält dann in der Esperanto-Sprache eine kleine Rede, die mit Beifall aufgenommen wird. Seine fließende Aussprache des Esperanto zeigte zur Evidenz, wie rhythmisch und wohlklingend die Esperantosprache ist, welche Schönheiten und Klangfülle sie in sich birgt. Herr Klotz spricht in polnischer Sprache über seine Eindrücke vom letzten Esperantisten-Kongreß in Krakau, schildert in feingewählten poetischen Ausdrücken die lichtvolle Gestalt des Schöpfers der Esperantosprache, Herrn Samenhofs, seine große Bescheidenheit und seinen tiefen Ernst. Nach Verlesung des Statuts schreitet man zu den Wahlen, die folgendes Resultat ergaben. Vorsitzender: Heinrich Zimmermann, Vizevorsitzender — M. Schultz, Schriftführer — L. Klotz, Kassiererin — Frl. Ernestine Heffner, Bibliothekar — Aronow, Oekonom — Speckt, Verwaltung — die Herren Alper, Bialozerkewski und Wegrowski. Die Versammlung beschloß, ein Telegramm an Dr. Samenhof abzusenden. Um 11½ Uhr wurde die Sitzung geschlossen. Die nächste Vereinsversammlung wurde auf Freitag, den 18. April, festgesetzt.

„Neue Lodzer Zeitung". 17 aprilo.

Letero de Teska.

14 aprilo.

Aminda Pajfo!

Depost iu tempo mi prepariĝas skribi al vi, sed, malfeliĉe, nek miaj elektrigitaj muzoj min vizitas, nek kaptas min la dia inspiro, nek eĉ mi posedas lokon por skribado. Revenante je 6 vespere hejmen, la tablo estas jam okupita per diversaj lernejaj objektoj, kiujn dismetis miaj du kunloĝantoj-studentoj; se eĉ iam mi trovas lokon antaŭ tiu trezoro sur kiu la unuan fojon ekvidas taglumon diversaj

flamiĝantaj vortoj de diversaj flamoj kaj gloraj vortistoj, tiam la konstantaj disputoj kaj interparoloj malhelpis al mi disvolvi la flugilojn kaj anstataŭ la levoj, mi flugis kun la vibrantaj en ĉielo pensoj mian fraŭlinan liton. Tieĉi, Konvinkite per propra iniciato, mi iame troviĝas en ĉiela lando de l'fantazio, endormiĝante jam, laca post ĉiutaga okupo mi ne sukcesas sorĉaperigi diversajn neatingantajn sonĝojn, nun pri senprofunda sufero. dum pri sentima fortego — ĉar Morfeo ĉirkaŭprenas kaj ĉirkaŭvolvas min per la oranĝaj fadenoj; mi do dolĉe ripozante, akompanate per ofte krio de Bruslo, en formo de simpla kisado. fermas la palpebrojn por tutaj ses horoj.

Kaj tio ĉi ripetiĝas jam de kelkaj semajnoj, tio estas de post kiam mi alvenis Varsovion. Mi pasas antaŭ mi tiun vetureton de ĉiutaj devoj, mi montriĝas en mi per fizika laboro la revenantajn sonĝojn kaj revojn, kiuj ordante ankoraŭ ie en fundo de mia animo, ĉiam pli kaj pli forte eliĝas kaj ekflamas, serpente ĉirkaŭvolvante tutan spiriton. Denove alfalas min pensoj pri jeli ĉion. Kion mi kun tia peno atingis. Kaj kion en la vastan mondon; por malsukcesi la servon de sinjoro Soto. por esprimi al ci mian sentimentan melestimon, por kraĉi al ci en la vizaĝon, por

komenci kun lia Fortuto la unuan batalon. Montriĝas antaŭ mi en la imago ia figuro en formo de Sfinkso kaj per rigardoj de ĝiaj ŝtalaj okuloj vekis min por la ago.

Por sufoki en mi ĉiujn ĉi eksplodojn, mi enfosiĝis en la laboron kaj dum tiuj kelkaj semajnoj miaj estroj ekvidis ke mi ĉiuflanke konas mian profesion kaj donas al mi tiel gravajn postenojn, kiujn okupas nur personoj kun multjara praktiko. Mi miaflanke fordonas al tiu labor tutan mian scipovon - kaj tiel pado koreziĝas per ritmo de ĝiaj versoj. Tiel elsarĉas la tutenhajn rimojn, tiel enmetas en poezian formon poemon de ĉiopovo, tiel mi penas doni al mia labor tian aspekton, kvazaŭ ĝi estus destinita por ekspozicio. Mi koreziĝas per ĉiu rekta linio. en ĉiun pecon de laboro mi penas enmeti tian belaspekton, ke ĝi nun ekrigardo ĝi prezentiĝas, kvazaŭ farita per manoj de artisto.

Kaj tiel en mi batalas du fortoj, la unua ŝiriĝas tien porke mi estis destinita, ĝi sopiras ĉio granda, ĝi volas ekkapti la solecan, individuan lokon inter la griza amaso, kies ekzisto iĝas ĝin plori je sia malsupreniĝo - la dua elkreskinta el la vivo mem, estante sekcio de la unua, fajfas aŭ almenaŭ forigas surpostan planon, la idealojn.

la vivon malproksime de la homoj. Ĝi iras rekte per vojo kiun paŝas plimulto de l' homaro, kaj vidas sur lia vojo ankaŭ abundajn profitojn nur realajn kaj alpalpeblajn.

Tiuj du fortoj en lastaj tempoj tiel ekzaltis unu la alian, ke, ŝajnas, fine unu el ili devas venki kaj ke ŝancoj estas egalaj, sekve la batalo estos morta, sed donus la rezultato matematike prezentiĝas x = x = 0.

Antaŭhieraŭ mi ricevis leteron de Jodus, en kiu li sciigas min, ke la direktoro de Nizkej liceoj demandis pri mia adreso kaj ke li intencas venigi min tien pro abunda laboro, kiun oni tie havas. Se ĝi efektive estus vero kaj se oni donus al mi bonan salajron, mi sen pripense revenus tiun urbeton, kiu multe plaĉis al mi, kaj kie mi restigis bonajn homojn tiel malofte renkonteblajn nuntempe. Malgraŭ ke de kelkaj tagoj ekfunkciis en la vetero forta reakcio, tamen multaj strietoj jam la ĉiam malnovajn verajn pri reveno de l' printempo, kaj mi havas tre belan okazon vidi somerloĝejon. Mi ne scias kial, sed en Varsovio mi ĉiamaniere ne povas aklimatiĝi, ĉar ke ankaŭ malmulte mi konas la lokan vivon, ke mi ne ankaŭ faris konvenajn konatojn, kaj ke miajn materialajn rilatojn mi ĝis nun ne povas ĝis tia grado egaligi por fari al si tian

agrablajon, kiel viziti almenaŭ unu fojon teatron aŭ publikan domon, sed diranta veron, ĉi tio mi multe emiĝas, malgraŭ ke materialo por legado ne mankas. Se mi estus forveturonta Niskon, mi troviĝadus kvazaŭ en vilaĝo, mi ĉe ricevus la saman ĉambron najbare de muelejo, kies la silenta, senĉesa bruo estis kiel poezio dum la kvietaj noktoj. Tie mi posedus jam iom da libereco dum vesperoj, ke por mine mia nova stato ĝi estus ĉe la plejbona rimedo. Kaj tie mi povus jam libere lasi flui fantaziajn revojn. Dume ankoraŭ mi neniom certe povas diri, sed mi antaŭsentas, ke rifuzi mi ne havas kuraĝon. Kion fari, mia kara, sed ĉu mi neniam sukcesos trovi la lokon, kie mi povus porĉiam ekloĝi, ĉu ne al mi ĉi tie ne plaĉas, sed la monotona vivo kiun havas tiuj milionoj da homoj ne trafas al miaj principoj, mi ne povas kompreni kun tia mesino plenigata de ĉiuj devoj; iuje destinita tro matene oficejon, laborante kiel bovo, vespere hejmen, lavu sin, alivestiĝi por iri kien? Cetere restu hejme, sed pardonu kun mi se por tiu celo vi ne estas agordigita, dediĉadu vin al ĝentileco, dum vi havas grandan volonton dum al intelektuloj li estas azeno, poste aŭ io simila. Mi sentas nun la necesan posedi multe da libera tempo kaj vivi en ia soleco, nur kun miaj malfeliĉoj

pensoj. alie mi tute perdos min en tiu svarmanta vivujo.

Feliĉaj estis tiuj iamaj tempoj en Lodz, dum kiuj mi tiel ofte kunvenadis en societo kaj eraragadis min mem ke mi multe faras por la homaro.

Ni estis kiel iaj politikaj agitatoroj, mi ĉiuflanke varbadis novajn adeptojn kaj kun tio mi sentis min kontenta. Ĝenerale kion mi pensas al tio konkludi? ke mi fordonis min al iaj celoj. ke mi por tiuj celoj oferis tutan mian liberan tempon kaj ne perdis mian trankvilan momenton preskaŭ pri tio alia kaj mi saĝe kaj konscience plenigadis mian vivon. Nune en tiu tempo frenezaj pasis, almenaŭ mi ekvidis en ĝi necesplenajn flankojn kaj homo devove mediti pri tio kio estas. Kion mi donus por tio, ke oni transportu min en tiun estinton, ke revenu tiuj tempoj. sed vane estas ĉe pensi pri tio.

Ekzemple mi en pasinta semajno vizitis tiun faman polan esperantistan societon, tiun iam tiel allogeman ejon, je kiu mi sentis preskaŭ kulton, en kies direkton mi tiel sopire ofte longedi okulojn kun kies famaj anoj mi tiel ofte dezirus konatiĝi. Mi vizitis ĝin kaj apreni de tie impreson, kvazaŭ mi ekvidus la kampon post iu milita batalo. Ĉiuj estroj de diversaj rangoj aŭ estas vunditaj

kaj unu kuŝas en malsanulejoj aŭ rezignis de siaj postenoj. Restis nur la plej nova generacio, multe diferenciĝantoj de tiu iama junularo; inter ĝi troviĝas ankaŭ iaj du, tiel do mia speco, sed tio estas nur escepto, ĉio prenite kune aliiĝis ja multe.

Dum mia vizito ĉeestis iaj dekdu da junuloj, sole de vira sekso kaj preskaŭ ĉiuj lernantoj de mezaj lernejoj, krom tio ankaŭ sinjoro Grabowski, sed nur pro tio, ke ankaŭ mi telefone demandis lin pri loĝejo de l'societo kaj li esperis ekvidi ian geston, alie li certe ne estus veninta. Mi ĉe ĝojis pro tio, ĉar dum tuta vespero li amuzadis la kunvenintojn per sia prelego pri jamboj kaj trokeoj. Li ankaŭ alportis kun si plenan kajeron de diversaj tradukaĵoj, kiuj, kiel li diris, faritaj estas pro memoro de diversaj revuoj.

Pri tiu vespero mi prepariĝas skribi iom por via Kroniko, tial plimulte mi ne parolos pri ĝi. Kvankam mi ne posedas grandan volonton dividiĝi kun vi per miaj impresoj kaj tial jam estas pasinta mi komunikas ĉi supre.

Ĉu vi scias ion pri Nestoro? Antaŭ longe jam mi sendis al li karton kaj ĝis nun li ne respondis, kio multe min ĉagrenas, ĉar li sola estas mia ligilo kun la mondo esperantista.

La ambaŭ vortarojn mi antaŭ kelkaj tagoj jam ricevis

kaj sciigis pri tio per poŝtkarto. Kiu ankoraŭ nune kuŝas en mia paperujo, same kiel ĉi-tiu. Kiun vi certe jam ricevis. Kaj kiu skribita estis antaŭlonge, ne Baĉo iam ŝtelis ĝin kaj alsendis, tial ke ĝi plaĉis al li.

Tial, ke vi denove malfermis al mi kontoron ĉe via bankoro mi do estos ĝis tiam saĝa kaj postulos de vi iajn facilegajn en lingvo germana; se vi povedas iajn novajn servojn, bonvolu ankaŭ sendi, ne en la afero estus rozgema, repage mi konsentas helpadi vin en la kronika laboro.

Bonvolu, Karulo, fari ĉi tion kiel eble baldaŭ ĉar per forte mi studas aŭ komencas precize studi germanan, por povi en tiu lingvo korespondadi, okaze, se mi returnonte estus Nikkow. Pro la tuta estraro konsistas el germanoj kaj mi ofte devigata estus veturadi diversajn materialojn el Wien aŭ Berlin kaj mi ne konas diversajn faktajn esprimojn en Esperanto, sekve la plej bona estas germana. Krom tio, okupiĝante per lernado, mi esperas okupi tiujn malmultajn tempon tiel perajn horojn, kiujn mi posedas liberaj.

Fiante do ĉi tiun vian ho longan leteron mi kisas vin tutte.

La poeziplenan bonvolu saluti

Karto de Leska.

3 de Majo.

Fajfo!

En via lasta karto vi respeguligis vin plejperfekte, ĉe la famaj el plej famaj pentristoj neniam donis al publiko tiel veran aŭtoportreton. Viaj sovaĝaj instinktoj kaŝitaj dum tiom da jaroj en kiuj ŝirmoj, fine ribeliĝis kaj vi ne plu bezonas la pupon. Ho, pardon-dio, kiel kolera mi estis je vi pro tro longa silento kaj nur pro mia ali malfortsento mi ankoraŭ prenas la plumon.

Ne povante dumtempe plivaste respondi je viaj unuaj koitvoluptemaj vortoj, mi deziras nur, ke vi efektive sekiĝu en brakoj de tiu malĉastulino, ke vi premeniĝu de ŝiaj mordkisoj. Ke ŝi venenigu vin per tiaj voluptemaj ĉirkaŭprenoj de l' piedoj—cu kiu dispremita vi estus kiel acidpomo. Ke ŝi per la stredîĝintaj mjolipoj elsuĉu vian sangon ĝis lasta guteto, fine mi deziras al vi, ke via peniso pro ofte uzado elongiĝu ĝis al grandeco de bovo, ke vi povu tiam entute kontentigi la neimageblajn postulojn de tiu malĉastulino.

Ĉe mi nenio nova, mi povas nur enviri vin pro tiuj seksaj interrilatoj, kiujn vi havas senpage, mi ĉiusemajne devis pagadi po unu rublo por similaj aferoj. Sed de kelkaj semajnoj mi

ĉeris kaj fariĝis entute bona sintenema fraŭlo.

Por festoj proksimaj mi ne veturas Lodzon, do bonvolu ankaŭ plenumi mian peton. Kiu atingos vin post kelkaj tagoj.

Salutu la droniĝantan en oceano de l'amo.

Via Eska.

<u>Fajfanto libertempas.</u>

en Gatków'a arbaro, 8 de Junio 1913.

Letero de Brunulo.

Lodź, 6 Junio 1913.

Kara Fajfanto!

Kia hazardo! Ĝuste hieraŭ, per ŝvito rosiganta frunton, mi komencis remunti mian rimnoman aparaton, dezirante ĝojigi vin per nova abortaĵo. Ĝuste hieraŭ mi rompis al mi la kapon kiamaniere kaj kun kies helpo tiu frukto vin povus trafi — kaj jen vi skribas, antaŭzorgeme aldonante la adreson. Nun estas „ĝojo en Sidono", ĉar la pereto de hieraŭ akuŝita abortaĵo ne migros en la larĝe malfermitan faŭkon de korbo, sed pace ekripozos en la glora Nekropolo de mia respektinda kronikisto. Tamen kun efektiva bedaŭro mi konstatis, ke miaj paroloj koncerne vian viv(el)fluon en vilaĝo, kaj kiujn kreis la kadukiĝinta poeta imago, estas nur pala bildo de efektiveco, do ankaŭ nur la nuna farmgeno, kiu tiun „verkon" enkadrigis, savos ĝin de la sendube forgeso de generacioj. Jen estas la fragmento. Kiun mi ne finis, nek intencas finon fari. Por la nunaj „kuketaj tempoj" ĝi sufiĉas.

Kvankam sen ora lirt' de liriko

Kaj sen iama poeta enfaro.

Ne miru, kara de Muroj amiko,
Ke mi denove sidas sur Pegaso.
Ja iafoje ĉe malplena spiko
Suprenleviĝas eu grejna oaro
Kaj kune bruas sub batad' de vento
Per la malplena kapo sen tormento.

Tial mi ankaŭ, la spiko malplena,
Premas krajonon... Estas mi en budo:
Kontraŭ skribtablo pejzaĝo ĝardena,
Por malfeliĉa Lodzan' „dziwo-cudo",
Branĉoj kliniĝas en estimo plena
Min kantigante per folia cudo —
Tial ke fine sentante esperon
Mi ekkomencas al vi ĉi-leteron...

Nun tamen staras antaŭ mi la baro
Kaj eĉ envio venis mian koron:
Vi ĉiuj vagas nun en la kamparo.
Matene iras saluti aŭroron,
Eble ripozas ie en arbaro
Lasinte ĉian enuigan laboron,

Aŭ kuŝiĝinte sur herba veluro
Kantojn aŭskultas vi de la naturo...

Ĉu kun la Nimfo el la valo
Vi nune flirtas... ĉu super bordo
De rivereto kun la akvofalo
Vi flustras amon kun akvi' en akordo,
Ĉu ĉe buŝeto ŝia el koralo
Por via kanto fariĝis la kordo...
Aŭ ĉe „ĉirpas" vi en branka rondo
Strofojn „mi serĉis feliĉon en mondo"?...

Ĉu, ĉe dante al de Parijo peloj.
Vi kun la revoj rompis l'aliancon?
Ĉi nun vin ŝtopas per ovaj omletoj.
Kaj la lakto... ĉe iam dancon
Kun via ventro komencis la beloj.
Ĉu la terpomoj... mi jam finis stancon.
Ĉar ekde... kovris vi nun la vizejon
Kaj ĝojakceptis sanigan masaĝon.

Celere-kundoj...! mia verda stelo

AŬTUNAJ FLOROJ.

DEK ORIGINALAJ POEMOJ DE

Dro STANISLAV SCHULHOF
EN PARDUBICE (BOHEMUJO).

1912.
UNIVERSALA ESPERANTIA LIBREJO
10, RUE DE LA BOURSE, GENÈVE (SVISUJO).
PREZO 0·25 Sm.

Min jam ne logas al plujo sombrida:
Sur mia „Ŝipo" disŝirita velo.
Masto rompita kaj penso rigida
Ne ŝtelas bluon el hela ĉielo
Por brodi strofojn kun kredo ortfida —
Mi je supraj plej do rezignas
Kaj post mesaĝo ĉiam punktojn signas.

Tamen punktojn mi metas ankaŭ jen daŭrigo. Kiu certe neniam estos. Tamen, mi pensas, ke vi ne bedaŭras, ĉar miaj mokoj ne devas esti al vi plezuraj, se ĉe ili estus ... vero. Nu, se iam denove animon vian vualos la benila sorenco, mi superŝutos vin per strofoj. Kiuj jam ne pikos, sed sole bonodoros.

Revenante al hodiaŭa tago mi rememorigas al vi pri la dato de 13a kun espero, ke en tiu tago mi ĝojos vidi vian bruniĝintan en suno vizaĝon kaj eble solidiĝintan dank' al penoj de l' Panjo - stataba. Dume mi kore vin kisas via

Brundo.

Ĵus mi ricevis trian volumon de Nestoraj poemoj: „Autunaj floroj" kun la aŭtografo de l' aŭtoro. Baldaŭ vi havos okazon admiri ĝin.

„Nowe ogniwo w łańcuchu życia”.

Niniejszym zawiadamiam, że w dniu 14 b. m. o godz. 10 rano, w Kościele Św. Stanisława Kostki, odbędzie się ślub córki mej

Bronisławy

z p. Antonim Mikołajczykiem.

Ch. Prümm.

Niniejszym zawiadamiam, że w dniu 14 b. m. o godz. 10 rano, w Kościele Św. Stanisława Kostki, odbędzie się ślub syna mego

Antoniego

z p. Bronisławą Prümmówną.

Antonina Mikołajczykowa.

IV.

En Vilago.

8 de Junio 1913.

5 de Julio 1913.

Al perfidulo de la Kroniko-Fajfanto,
la perfidulo de esperanta poezio - Brundo
tiun-ĉi kanton dediĉas.

Kanto de perfidulo.

Kie vi estas mia espero.
Fervora mia por la afero,
Nenio vivon vian atestas
- Kie vi estas?

Kie vi estas antaŭa flamo.
Fido antaŭa, ardanta amo.
Tajna nenia postsigno restas
- Kie vi estas?

Ĉu vi, ho freŝa, bela espero.
Jam adiaŭis hela somero.
Ke nun vi kvazaŭ en l' aŭtuna
Arbeto juna?

Ĉu vin, ho sindonema fervoro,
Pli malvarmigis de la laboro,
Ke vi vin kaŝis kun ia timo
En la animo?

Ĉu vin, ho juna, brilante flamo,
De l' mond' estingis homa malamo,
Ke vi nun iĝis el suna ĉarma
Cindro malvarma?

Ĉu vin, ho granda infana fido,
Rompis nesperta flug' de aglido,
Ke nun en koron sur kapra nubo
Enŝtelis dubo?

Ĉu vin, ho sankta homara amo
De l' propra hejmo sufokis dramo,
Ke nun ĉi-monda sent' de l' animo
Ŝajnas la krimo?

Ho Esperanto! La Providenco
Al vi destinis esti potenco,
Kiu forigos sangan minacon
Kaj faros pacon,

– Se vi sur tiu malgaja tero
Estas de bona estont' fajrero,
Kiu post longa kun krim' batalo
Fariĝos faklo, –

Mi por honoro via kaj gloro
Ĉiam elŝpinus kanton el koro,
Kiam ne aŭdis de la familo
Iu terfilo . . . .

Sed eĉ se via bela espero
Neniam iĝos fakto sur tero
Kaj se de via afer' en mondo
Degelos rondo,

Se laborantoj sindonaj viaj
Nun mortadis post la aliaj.
Ĝis restos lasta sur la remparo
Malgranda aro –

Eĉ tiam penos mi el animo
Fieran morton laŭdi per rimo,
Korojn karesi dum agonio
Per melodio ....

Kaj ĝis sur teroj ebenaj vastaj
Brave sin tenos soldatoj lastaj,
Mi restos firme apud standardo
Fidela bardo.

Junio 1913.

Al Brunoza.

Aperis por momento
Kaj tuj forflugis jam —
Ektuŝis kiel vento
La koron ama flam'.

Montriĝis, malaperis,
Ha, kio estis ĝi?
Kaj mi jam ekesperis...
Ĉu bild' ĉi estus vi?

Okulojn suprenlevis
Mi por ekvidi vin —
Ha, kiel kor' ekrevis,
Feliĉ' ekprenis ĝin.

Apenaŭ sonĝo dia
Ankoraŭ unu foj',
Kaj kun ĝi bildo via —
Plenigos kor' de ĝoj'.

Eska.

Varsovio, 14 - IV - 13.

Al Brunoza

Ĉe l' bord' Lorenta dum sunsubiro
En la kampoj natur'-odoro,
En antaŭnokta belmaja horo
Pri vi mi pensis – kun la sopiro.

Mi serĉis longe koron en mondo,
Inter virinoj mi serĉis vane,
Kun mi vagadis nur akompane
Sopiro – mia kunvagabondo.

Al vi mi iris... al vi mi iris...
Tra l' vivo kruda, tra l' kosm' lazura
Super mi brilis ĉiel' velura
Kaj mi sopiris... kaj mi sopiris...

Al vi mi iris tra l' fremdaj teroj
Kaj vin mi serĉis inter anĝeloj...
Estingiĝadis super mi steloj,
Apud mi bruis belaj riveroj.

Bruis riveroj dum susurbiro
Kaj mi ektremis en la inego,
Ke kiel venas post nokto tago –
Tiel pereos mia sopiro.

Sed ne pereis... sed ne pereis...
Ĝi kiel pluva tago aŭtuna,
Kiel vespero vintra senluna –
Melankolie en koro veis...

Ĉe l'bord' torenta dum susurbiro
En la kampara natur-odoro,
En antaŭnokta belmaja horo
Pri ŝi mi pensis kun la sopiro...

Eska.

Varsovio, 5 majo 1913.

(danke al afableco de Brunore)
F.

Umowa.

(aristio: Brunora kaj Mencio.)

My, niżej podpisani, Stanisław Zygmunt dwojga imion syn Juliana Braun (Wiktor Elski) i Waldemar syn Jana Pfeiffer, zawieramy umowę, na mocy której wyżej wymieniony dwojga imion Stanisław Zygmunt syn Juliana Braun odstępuje Waldemarowi vulgo Włodzimierzowi synowi Jana Pfeifferowi cały swój dotychczas drukiem nieogłoszony dorobek literacki, znajdujący się u nabywcy, na następujących warunkach. Nabywca prac literackich w języku Esperanto Brauna-Pfeiffer staje się ich prawnym i jedynym właścicielem, oraz służy mu prawo ogłaszania tychże drukiem pod własnem nazwiskiem lub pseudonimem, z zastrzeżeniem podpisywania nazwiska lub pseudonimu, oraz ich inicjałów, Autora. Wzamian zato Pfeiffer obowiązuje się Autorowi za każdą drukowaną pracę płacić książkami w języku polskim w stosunku 16 do 1 (16:1). Niniejsza umowa, spisana na dwóch arkuszach (egzemplarzach), obowiązuje od dnia spisania niniejszej umowy.

Łódź, dnia 23 Lipca 1913 roku.

(podp.) Stan. Zygm. Braun (Wiktor Elski) Włodz. Pfeiffer.

Korto al Petalo.

Łódź, 24 de Julio 1913.

Duan „prezów" de netalegcalaj, hieroglifaj subskribaj kun ilia transskribo kaj kun koraj salutoj sendas lodzaj gesamideanoj:

Brunora

Fajfanto de Fiff

Menero

Brunulo.

Fajfanto – Włodzimierz filo de Jan Pfeiffer.
Menero – Remigjusz Mene-Męczyński.
Brunora – Alicja Braunówna fratino de
Brunulo – Stanisław-Zygmunt dwojga imion Braun, vulgo Wiktor Elski.

Korto al Nestoro.

Łódź, 24 de Julio.

Korajn salutojn kaj plej humilan petou pri donu de viviga sendas du palej samideanoj

Brunulo.

Fajfanto.

I

El la ciklo:

La pola vilaĝo.

Do unu flanko torento petola,
De dua alta betula arbaro,
Ĉirkaŭe kreskas de tritiko maro,
En kies mezo — la pino izola...

La preĝejeto kun tero kupola,
Tie vidiĝas de dometoj aro,
Apude kiuj el stoni palisaro.
Se aŭdiĝas la kanto kukola...

Dum subiranta jam sun' agonias
Kaj malaperas lumi abundobrila,
Tiam ĝi estas plejbela pejzaĝo...

Somere, vintre de l' ĝoj ĝi radias,
Ĉiam senbrua, kvieta, trankvila...
Jen simpla bildo de l' pola vilaĝo.

Viena, 2-I-12.

II.

Rikolto.

De la tagiĝo ĝis la sunsubiro
En la kampoj la laboro bolas;
Tempo rikolta... ĉiuj neprevolas
Plej baldaŭ fini... Kaj kun la admiro

Suda moveco, kvazaŭ en deliro.
Sub la falĉilo sin grenoj tavolas...
Kaj en ĝi are cikadoj frivolas...
Ofte aŭdiĝas el brustoj lacspiro...

Tre longe pluvis... nune el sub nuboj
Plene radias la suno oroza...
Ili rapidas, ĉar la tempo kora.

Antaŭnelonge grenoplenaj kuboj
Maturaj staris... en stato ripoza
Kaj nun — malplenaj — kvazaŭ spaco mora.

Vieno. 2-I-12.

III.

La Kverko maljuna.

Apud lageto ĝi staras ... maljuna.
Tre alta estas ... aspektas majeste ...
Abundaj branĉoj kreskas arbaleste
Kaj diversforme – el trunko komuna.

Dum la somero, hela tago suna
Ĝi sin spegulas en lageto, feste.
Verde vestita ... kaj dum tempo aŭtuna
Per sekaj branĉoj bruas manifeste –

Kvazaŭ paroli volus kun ekstazo,
Pri l'pasinteco, pri l' tempo aŭrora.
Kiun ĝi vidis dum vivado sia ...

Travivis multon ... ne unu okazo
Antaŭ ĝi pasis ... ĝojo aŭ dolore
Por la Polujo – kara hejmo mia.

02-7-12. Eska.

Hej, brilegantaj sonĝoj miaj junaj!

Hej, brilegantaj sonĝoj miaj junaj!
De l' brust' flamanta altflugaj revadoj
Banitaj en helaj radioj sunaj;
Hej, pensoj miaj! Koraj Kamaradoj!

Volaj de l' flugo ĝis hela lazuro,
Suno kaj steloj — vin ili timigos.
Vi ŝtoniĝintaj en rapida kuro
En loki ekspandos, sed min ne haltigos.

Hej! nun forestas vi jam ... malespere
Nun en animo sin trenas grizeco
Kaj la malpleno min premas mistere...

Kaj nun pereis la revoj altflugaj,
Kiel la eĥo en nebul' surdeco —
Dum la aŭtunaj ploraj noktoj nubaj...

Eska.

Krakovo, 14-12-10.

II. Respondo al amiko mia
(I troviĝas en III vol.) Stan. Schulhof.

Per la longaj tre belaj lit' via eksonis,
Impresige kaj mejstre eklusis vi kordojn —
Eligante el liro potencajn akordojn
Kiujn ludi nur kelkaj en nia lingvo konis.

Bedaŭrinde ne multajn kantojn vi komponis,
Ĉar ĉi tiujn unuajn sed majstrajn agordojn
Ĵus surdigis la altaj ŝtonoplenaj fjordoj...
Ĉiej ĝiaj en vasta mara spaco ŝtonis.

Sed la eĥon ne perdis vi kaj ekaŭdos
Mond' ankoraŭ la kantojn viajn plej sincerajn.
Ne surdigos jam ilin bruvoĉa krio —

Kiu nune aŭdiĝas kaj kiun aplaŭdos
La kritiko tre ofte, anstataŭ severajn
Vortojn skribi al tiu kanto pri-nenio.

Vieno, 10-I-12. Eska.

Finał.

Wytężyłem całą swą siłę nadczłowiecką.
Falujące krwią wszystkie żyły me nabrzmiały,
By ukochane sercem zdusić ideały...
Krwią serdeczną, krwią ciepłą serce me ocieka...

Z korzeniami wyrwałem duszy kawał cały,
Przepotężny stłumiłem w sobie ból. Daleka
I ciernista, lecz inna droga na mnie czeka...
Już idę ... pierwszej trąbki wszak słyszę sygnały.

Śmiało stępam na nową drogę mego życia,
Całą przeszłość wyrzucam siłą z swej pamięci,
Rany wyschną, gdy tylko świeży wiatr zawionie...

Niedokończony kielich został do wypicia.
Gdyż mnie zawartość jego już więcej nie nęci...
Już idę ... w jakimś morzu znowu gwiazdę łowię.

Koniec.

Wiedeń, 12 - I - 12. Leska.

Laŭ originala pola.

Ho, mi riu ames!

Ho, mi riu ames! ĉi parolaj
Mirinde sones en la Kor',
Ĉu ree en la aŭreolaj
Por mi odoras ĉiu flor'?

Ĉu mi ĉi-amon devas kredi,
Denove penzi pri l' esper',
Ĉu mi do povus reposedi
Feliĉon rivan sur la ter'?

Ho, mi riu ames! estí povas?
Ĉu min ne trompas iluzi'?
Ah, ne! Ĉar ĉio pro ĝoj' blovas,
Ĉie gajecon vidas mi.

Animo mia fajre flames.
Jen malaperas dolĉaj for
Kej mi denove kredas, ames -
Re odoras por mi flor'!

Ho, mi vin amas! Sun' radias -
Aŭdiĝas liaj voĉoj nur.
Min, ŝajnas, tuta mond' envias ...
La tuta tero kaj natur'!

Animi' flugilojn ricevas,
Jam malaperis la sopir' -
Kaj nun konstante mi nur revas
Pri l' dolĉa ama eliksir' ...

Eska.

Vieno, 19 Jan. 1912,

✓

Dolor' per akraj dentoj koron mian mordas ...

Dolor' per akraj dentoj koron mian mordas
Kaj mi estas simila al la somnambulo,
Malgraŭvole la sentoj, kvazaŭ laŭ postulo,
En obeo humila, en nodoj sin tordas.

Tamen plene trankvila paco koron ordas,
Ĵuto sen la lamentoj kaj sen la skrupulo,
Nur kun la vitrobrila flamo en okulo
Mi superas ... turmentoj venko min rekordas.

Eĉ nek unu parolo pro tiu supero
En vundita kor' mia riproĉe ekveas –
Esti devas ja forta homa karaktero.

Nune mi al fortvolo konstante obeas
De l' doloro ebria, tamen konscience
Mi per pulso aorta regas min potence.

Eska.

Vieno, 25-I-12.

Rondo.

Post longa foresto mi vidas vin nune
  Kaj ĝojas, esperas denove la kor'.
Do ree mi povos estadi ni kune,
Ĉu plori, suferi aŭ ĝoji komune...
  Ho, kara, amata, ne iru jam for.

Mi vidas estinton, dolore memoras
  De kiam en mondo mi vivis, solul',
Ekpensi pri ĉio kaj brusto doloras,
Okuloj lumiĝas, la koro ekploras.
  Kaj vivon ĉirkaŭas la nigra nebul'.

De kiam ekstaris sur vojo vi nia,
  Radie rigardas la mondon mi nur
Kaj sento de l' forta potenca, magia
Plenigas la koron — tra vitro radia
  Mi vidas nunecon en hela lazur'.

Sentema mi estis pri ĉiu sufero.
    Ne povis batali kun vivo mi plu —
Ĉar ŝajnis ĝi esti terura infero,
En kiu obliĝas plejĉia espero...
    Ne povis ekkoni mi vivon kun ĝi.

Sed nune fortege la bruston diskrevas,
    Neniam subiĝos al mondo mi jam.
La kapon kuraĝe, fiere mi levas.
La ĉiun deziron atingi mi devas,
    Ĉar helpos min ĉiam de l' vero la flam'.

Leska.

Lwów, 7 - VIII - 11.

Alvenu vi.

Alvenu vi –
la sonĝo elrevita,
saniga balzamo,
alvenu vi ...
Ardanta flamo
en koro kaŝita,
la fajro brulanta tormente,
ŝiranta l'animon sopiro
forigos ...
Akceptos vin koro kontente,
paciĝos
doloro post via aliro ...
Alvenu vi kaj lumu
la koro nia.
de la ekstazo ĉarma.
de la ekspiro varma
via –
forgeso pasintecon,
ne plendo plu dolore –
sed ĝoje kaj tutkore

ĉarmin solulecon –

Alvenu vi ...

Juneco mia nuba,
pasinta la malhela,
nuntempa vi' sensuna ...
Hej, sonĝo vi anĝela,
hej, revo vi alflugo,
hej, vivo mia juna!

Kie vi?...

Alvenu do
de l' vivo kor' trankvila,
ĉar krevas la koro,
sopiras tro ...
Ne laŭvoj' gloro,
estonto la brila,
nek vortoj de ies estimo
kaj homa mielaŭdo – mensoga –
cel' mia –
la revo de l' mia animo
radia –
ideo pacama alloga ...

Aperu do vi, kara,
Kore amata,
Ĉu kun la bruo mara,
Ĉu kun la ĝui nektara ...

Frata
akcepto vin atendas,
mi kun la kor' ĝojplena,
rigardo senĉagrena
jam manojn disetendas ...

Aperu do ...

Eska.

Krakovo, 16-VIII-10.

Mi dankas vin, vivo!

Ne ekkonis mi feliĉon ĝis nune,
Domon mian ĝojo ĉiam evitis,
Junaj jaroj pasis preskaŭ aŭtune ...

Kaj se ia min okazo ekscitis,
Tio estis certe de l' kor' sufero
Aŭ doloro ĝeman krion incitis...

Ne konatan al mi estis amkvero,
Ĉiam iris mi tra l' vivon mem sola
Kaj se ia min minacis danĝero,

Malgraŭ, ke mi ĉiam estis izola —
Min ne kaptis senespero tormenta,
Mi ne aŭdis pri la vorto konsola.

Tamen estas mi de l' vivo kontenta,
Ĉar ĝi donis al mi forton magian,
Ke mi povas en kvieto silenta

Superregi kordoloron la mi'an
Kaj rigardi ĝin nur kvazaŭ fiktivan;
Sed' vi donis al mi limon foli'an

Kaj pro tio kore dankas mi vivon.

Ezka.

Vieno, 4 - II - 12.

La lasta venko.

Senĉese la sopiro ŝiras mian koron.
Rememoroj ondare la kapon alfluas
Kaj en pensoj momentojn mi plu kontinuas.
Kiun iam mi vidis kvazaŭ meteoron.

Ne plu povis obei mi volon - mentoron,
Kiu nune senĉese min bone influas -
Ĉi-ordanta sopiro intimon detruas,
Ĉar inter min kaj volon starigis - memoron.

Kaj elstreĉis mi fortojn de la superhomo
Por sufoki en koro iaman pasion.
Kiu nune aperis kiel la fantomo
Kaj englutos en bruston maldolĉan absinton...

Koron premis doloro kvazaŭ de l' Tantalo,
Sed nun kontraŭ suferoj staras mi - vandalo.

Eska.

Vieno, 6 - II - 12.

J

El la letero

al Dro Stanisław Schulhof.

Amata!

Nin jam forlasis gastoj, samcelanoj,
Finiĝis tagoj de l' unu Kunvivo,
Disiĝis kvazaŭ la fatamorganoj ...
Dume, pensante ke le efektivo

Ĉi-tagoj estis troviĝej kune
Mi preskaŭ kredi ĝin nevolas nune.

Tamen ĝi estas tute simple vero,
pruvas ĝin bone la bronza medalo
Kaj de „Bulteno" la lasta numero,
Kaj fine ĉiu krakova ĵurnalo,
Kiuj grandove sur la tablo kuŝas
Kaj per presaĵo rememoroj tuŝas.

Rapide pasis tiuj tagoj helaj,
Tempo de ia spirita ekscito,
Kvazaŭ prenitaj el rakont' fabela
Pri homo nova, hom'-kosmopolito,

Por kiu tuta mond' patrujo estas
Kaj nur kelktagojn en ĝi jare festas.

Neniam sentis mi min tiel sola
En vivo, kiun amas mi tutkore;
Kaj kvankam nacieco mia - pola
Kaj multaj min avertas monitore,
Sed mi pro amo al homar', tutmondo
Pli bone sentas min en via rondo.

Tial persvadu, amiko mia,
Ke en la tempo de l' ekscit' spirita,
Dum kiu tuta vivo ŝajnas fia
Kaj ĉiu proksimulo jezuita,
Al vi mi skribas por trovi forgeson
Des pli, ke skribi mi sentas neceson.

Alvenas foje tiaj tagoj grizaj
Dum kiuj la sencela viv' suspremas
Homon, per siaj diversformaj flizaj
Kaj ŝajnas tuta mond' doloro ĝemas
En la anim' de un' nur persono...

Superas ĉiam li pro miliono.

Kaj kvankam mi ankoraŭ estas juna
(Kaj al juneco mondo apartenas)
Tamen la tuta travivo ĝisnuna
Montras, ke nun la vivo nur katenas,
Ĝi malebligas disvolvi flugilojn,
Kaj elŝiritajn aligi sunbrilojn!

Kaj ĉu vi povas kompreni, karulo,
Kian doloron sentas kor' fiera,
Kiel la revojn nun kovras nebulo
Per ĉiutaga grizeco despera, —
Kiu anstataŭ plu flugi ĉielon
Falis jam laca sur la nigran teron?

Kaj ĉu vi povas kompreni la homon,
Kiu post longa spirita batalo
Preskaŭ jam trovis oportunan domon,
Nealingeblan per al mond' signalo,
Kiun okaze alfluintaj ondoj
Denove ŝiras al aliaj mondoj?

Ĉu jine povas ni kompreni homon,
Kiu de l' mondo portatas neniam,
Kiu ne celas glorigi la nomon,
Kiu jam ventkis revoj̃, fantazion -
Dum forgesite venis atmosfero
Kaj lin direktas nur al afero?

Ho, mi ĉiam ankoraŭ amiko kora,
Ke ni, el koro dissinite lia,
Kies ĉiu nomo - propre homara
Kaj resto propra kaj la familia.
Fans plejĉiam similan dividon -
Inter la mondon, ĉiun kaj idon.

Mi bedaŭrinde ne povas imiti
Vin en simila doloro atkeso,
Ĉar se ideo min povas ekciti,
Tiam ŝanĝigas koro je lopaso
Kaj batas tute, forte kiel stono,
Por la ideo, celo aŭ persono.

Tial, amate, ni estas diversaj,

Kiam tormentow homi sufeni devas,
Jo en fojesow vivo lin Katenes
Kej vekigilw Kri denove revas –
Pri flug' al suno, al helej lazorj
Dum viv' alpremas lin al terej murj.

Jo el či-lin letero en vimoj
Rompludos ceste i sew ia pleno,
Ke, alvenintej Krakovon pilgrimoj
Flamigis Korow per dolča venenow...
Kin plendas sole či-enterow,
Ke el libera homo faras sklevow.

P. S. Eska.

Ankorau petas mi vin, Kara mia,
Kiow i ceste mem antaue faro,
Či vortojn legi de de l' poezia
Ai Kritika vidpunkto, mi preparo
Al i alian leterow en prozo,
Jed jam plisajaw Kej sew gem', mimozo.

Krakovo, la 18an de Aŭgusto 1912.

Lingvo Esperanto.

Kvankam vi estas nur arte farita
Sed por mi ŝajnas vi plej bele sones...
Lingvo amata por mi multkvalita,
Vi ĉiam pli kaj pli al mond' impones.

Ho dolĉaj sonoj, kiun kiu nur kones,
Do ŝanĝi povas je skulptaĵ' granita
Aŭ multvaloran muzikon kompones —
Kaj tial estas vi de mi amita.

Vi regas super tuta tera globo.
Per vi parolas hom' diversnacia
Kaj flamas koroj pro fier' kaj ravo...

Kaj venos temp' de l' via tutepoko,
Amata lingvo kun sono radia,
Kies mi estas amanto kaj sklavo.

Eska.

Krakovo, 19-VIII-12.

Ĉe la revoj.

Ofte en vespera horo
Kun la freŝa florodoro
Revoj alfluas –
Kaj per bildoj-iluzioj
Aperantaj sonĝvizioj
Koron mian skuas.

En orbriloj diademaj
Fluas revoj perfidemaj,
Apud mi sin trenas –
Kaj l'animon plensopiran
Malproksimen spacon mian
Ŝi kune forprenas.

Kaj ke viv' mahde griza,
Nuntona, seka, fliza,
La animon ĝojas,
Tial ŝi kun la revaro
Kiel jam amika paro
Vastan mondon flugas.

Per la agle flugi' lezeran
Ĉielbluon stelporporan
Kuras ĝi rapide
Kaj freŝecon de l'aero,
Plenan senton de l'libero
Ĝuas ĝi avide.

Flugas ĝi en subĉielaj
For de l'vivo bagateloj,
Kiel sonĝo pura...!
Ĝis la bildoj, iluzioj
Malaperos kun vizioj
De l'ĝuo plezura.

Leska.

Krakovo, 1 – IX – 12.

√

Antaŭen!

Antaŭen fratoj ni,
Ni murojn rompu antaŭ ni!
Ĉar antaŭ ni, post tiuj muroj,
Estonto brilas en lazuroj...
Ni la ideojn devas nur
Je viva vesti la kontur',
Ke estu ili ne nur frazoj
Sed por novmondo fortaj bazoj,
Sur kiuj baldaŭ tuthomar'
Ekstaros — la familiar'.
Do iru ĉiam ni al celo
Kun forta kred' kaj senŝancelo.
Malgraŭ survoje akra kord'...
Fiere flirtu la standard'
Ĝis kiam nia sanktafero
Ekregos venke sur la tero.
Do, antaŭen fratoj ni,
Ni murojn rompu antaŭ ni!
Ĉar antaŭ ni, post tiuj muroj,
Estonto brilas en lazuroj...

4 - IX - 12.

Va tout!

Kun sorto mi komencis monbatalon.
Ĉar atendata tempo fine venis —
Ĵus longe trinkis mi maldolĉan galon
Por kiu ĝi abunde min venenis.

Mi fervoran agon entreprenis,
Sed tro jam regis sian ĝi vasalon,
Nun ĉiujn kodojn mi jam maltrafenis
Kaj kontraŭstaras sorton-la vandalon.

Je grandioza forto brusto plena.
Ĝi preskaŭ krevas jam de l' sent' rezista,
Vulkane brulas kiel fajr' gehena.

Al la batal' min pelas pens' insista
Kaj elstreĉinte superhoman forton
Mi ĝojas jam, ĉar venkos mi la sorton.

Caka.

Krakovo, 9 - IX - 12.

La Rajero kun le poemoj de Leska, antaŭ tri semajnoj transdonita al mi per lia sendito - Baĉo, enhavas krom le gebaj poezioj, antaŭ Kelkeja, kiuj troviĝas en la Iriar, sub dato de 9 Novembro.

Jubo mi donas ilian titolaron:

- v La pola vilaĝo.
- v Rikolto.
- v La kvarko majuna. ..
- v Responde al Simono. II vol.
- v Al amiko mia W. Pfeiffer. I ..
- v Hej, briganthaj sonĝoj miaj junaj! pardonon mi almetas. II.
- v Al A. B.
- v Responde al amiko St. Schulhof.
- v Finat.
- v Ho, mi vin amas!
- Letero al ĉiuj redaktoroj de niaj gazetoj. II
- v Al la vorto - espero - mi plu jam ne fidas. II
- v Doloŕ per akraj dentoj...
- v Ekzilito. III.

✓ Revido.
✓ Sopiro mia. I.
✓ Albumon vi...
✓ Responde al Viktor Elski. (I)(II) II.
✓ Mi dankas vin, vivo!
✓ La lasta vento.
✓ Ho, kiel dolĉa sento – estu la doloro...
✓ Al Sinjorino Mario Hankel. III.
✓ El la letero al D-ro St. Schulhof.
✓ Lingvo Esperanto.
✓ El la revoj.
✓ Antaŭen!...
✓ Va tout!
✓ Venu do ĝojoj... III.
✓ Kun ventego en paro... III.

√

Al A. B.

En la kvieta kaj luma vespero,
Ni iris tra l'voj' ombroza
Kaj vigle interparolis...

Pri la urĝa kaj grava afero.
Pri la sent' juniora
Vin ekdemandi mi volis ...

Brilis oriente la luno radia,
Ĉie silento magia.
Apude fluas torento ...

Kaj ni dum tiu vespero promenis.
Mi manon vian ekpremis –
Parolas pri la sento ...

Sed vi kun rido plengaja, petola.
Seninterrompe babilis,
Rigardas mian vizaĝon –

Kaj tute, ŝajnis, ne estis scivola,
Ĉar iom al mi konsilas ...
– Mi perdis do la kuraĝon.

Kaj, ŝajnas, perdis mi ian trezoron,
En brust' eksentis doloron,
Sufere koro premiĝis ...

Ĉu vi foriris?... mi bruon konstatas ...
Ah! tio horloĝo batas
Kaj mi el sonĝo vekiĝis.

Ezka.

Vieno, 4-I-12.

(tralarila)

Budo.

28 de Julio 1913.

Sovaĝaj floroj.

Aro da originale en Esperanto verkitaj poeziaĵoj.

verkis

Czesław Kozłowski.

Berlin, Lankwitz, 1908 - 1909.
Kiev, Malo-Vladimirskaja, 1909 - 1912.
Prusy. somero de 1911.

BUK

Al mia mortinta amiko

p. E. R.

Ne plu ridas en Kaŭkazo
Ni sur mont' en belvedero
Ĉirkaŭita de hedero.
Vi ne montras en ekstazo
Al mi oran sunsubiron
Kaj aloan florspaliron!
Hej, amiko! Hej! por kio
Vi foriris tiel frue?
Kun mi restis nur enuo,
Restis nur melankolio!

Hej, amiko! vi revenu!
Al Kaŭkazo mi reiras, -
Kie brilas sun-rubeno,
Maron bluan mi admiras!
La cipresoj tie sternas
Foliaĵojn el arĝento,
Kie blovas milda vento,
Parolante pri eterno.

Ni reiros al Krimeo,
Dronu vid' en mar' respira.
Kaj nin kanto de kubino
Akompanos tra aleo.

La amiko ne revenos:
Sur tomb' ni plantis kverkon,
Kaj la peza plumba ĉerko
Vin, amiko, bone tenas!

K. Kozłowski.

Ili kaj mi.

Ili dancas, ili ridas, --
Mi en mia ĉambro sidas ...
Ili gajaj ŝercojn diras, --
Mi silentas... kaj sopiras ...

Dum mi pensas pri la fonto
De la vivo, de ekzisto, --
Tie sonas la rakonto
De sentonta spritegisto.

Dum mi pensas pri mortinta
Kara mia kamarado, --
En salono falsa tintas
Malsincera laŭtridado.

Ĉe tableto la sinjoroj
Gravmiene kartojn ĵetas;
Post momento ekdisputas ...
Parigas ilin oro.

Sinjorinoj kolojn nudajn
Montras... ardas la okuloj.
En angul' pri ili kredojn
Ŝercojn diras la junuloj.

— — — —

Ĉambron mian nur lumigas
Kandelflam' en nokta hor'.
Mallumeco kaĵon ligas,
Malgajeco ligas koron...

Tie sonas la moderna
Ekscitanta melodio...
Oni dancas en salono.

Kaj mi pensas pri l' eterna,
Vera plej filozofio
De l' saĝulo Salomono:
„De vantaĵoj vanta ĉio!"...

Cz. Rozdowski.

Maja Lago.

En ĝardeno
La jasmeno
Kaj konvalo
Ĵus ekbrilis...
Ĵus ektrilis
Najtingalo.

Sur la bedo —
Florbukedo...
Ardas rozo...
Pepas gaje
Birdo maja
Sen ripozo.

Luna lago...
Sur la lago
Ĉe l' arĝento
Puŝas paĝojn
Nefunĝanajn
Petolvento.

En lambejo,
Mortintejo,
  Roz' ne brilas.
Nek kanvalo...
Najtingalo
  Jam ne trilas...

Jen sub kverko
En plumb' ĉerko
  La amiko...
Roz' ne floras...
Post li ploras
  Nur saliko.

Regas ĉie
Tradicie
  Reĝ-Silento...
Nur ekblovas,
Herbon movas
  Petal' vento...

Cz. Roziowski.

Patrolando.

„Slavo sen lando vivi ne povas,
„Riĉa la floroj – sen akvo"...

Jam vagis mi de tie
Ĝis la mondajn randojn:
Ĉie trovas – malproksime –
Pli liberajn landojn...

En ĉi-lando mi admiras
Morojn kaj kutimojn:
Regas tie egaleco
De limoj ĝis limoj.

Sed al mia ĝoja sento,
Al mia admiro,
Miksas sin post kelka tempo
Iom da ... sopiro.

Kaj post jar' belecon ne plu
En la land' mi vidas...

Luo mi ŝipetow blankaw.
Al patruj rapido

Tie falo mi sur stepow.
Ĝian brustow kiso.
Kaj per haroj grizew polvow
De l' herboroj viŝo.

Mi revenu al vilejo,
Junec' kie pasis.
Mi ĝiw kore pardonpeto.
Ke mi ĝin forlasis.

Mi revenu en arbarow.
Tra vojetoj ŝiro
Kaj cejanoji, kampanoloj.
Por bukedo ŝiro.

Pro la vid' de kvazi ripozo
Laciĝinta cerbo ...
Mi min banu kun volupto
En la mola herbo.

Vi ne flugu...

Vi ne flugu al steloj per penso:
Ja blindul' vidi sunon ne penas.
Tro malforta ja estas la menso,
Kies fortojn la korpo katenas.

Vi esploru internon de l' tero,
Vi esploru la pezon de l' polvo, —
Sed neniam montriĝos la vero,
Sed neniam aperos la solvo.

Certe longe, tre longe homaro
Sian poton ankoraŭ la digon,
Sed nun, kiel post mil miljaroj,
Ĝi ne trovos kredindan klarigon.

Malaperos la homo de l' tero,
Jam mem disŝutiĝos je polvo, —
Sed neniam montriĝos la vero,
Sed neniam aperos la solvo.

Cz. Kozłowski.

Saluton!

Mi vin salutas, diino blondhara,
Vin, kiu donas en velkanta nro.
Kiu dum nokto, en densaj arbaroj,
Brilas en milda kapreol-okulo.
Vin, kiu donas en velkanta nro.
Vin, vidigantan en lumo saluta,
Vin, ne konantan riporon!

Mi vin salutas, estejo silenta,
Vin, kiu migras super tuta tero,
Kiun disportas la spiro de l' vento,
Vin, kiu nokte, en mallum' senfina
Migras sentime super tuta tero.
Vin, aŭdigantan en ploro patrina, -
Mi vin salutas, Espero!

Mi vin salutas, vi nekomprenita,
Kiun mi konas, sed kiun ne vidas;
Kiu jen vekas al montoj granitaj,
Jen al kisado de la flor-petaloj;

Kiun mi sentas, sed kiun ne vidas;
Vin, kiu tiras min al idealoj,
Kiu eklecon prividas.

Vin, tiel fortan kaj tiel malfortan,
Sur kies brakoj pendas ora liro!
Kiu dolčiges kruelecon sortan;—
Cu via mano - kruco kaj ponardo,
Sur via brako pendas ora liro.
Cu la okulo melhumila ardo, —
Mi vin salutas, Sopiro!

Cz. Kozłowski.

Barcarolla.

Iras nia bark' silente,
    Milda estas nokt-aer'.
    Luno brilas en ĉielo,
    Kaj ĉi tiun brilo hela,
Kaj ĉi tiun lum' arĝenta
    Speguliĝas en river'.

Remu, remu, knaboj bravaj,
    Jam proksimas la insul':
    Ni sur ĝi ripos kune
    Ĝis leviĝo de la suno...
Sur betuloj, floroj ravaj
    Ripozos la okul'.

Leviĝinta matenruĝo
    Nin revokos al labor'...
    El la kampo bova muĝo
    Memorigos la plugilojn:
Ni ekkaptos la remilojn
    De l' insulo nun for!

Unuiĝo.

Li diris: „Naturo por mi ĉiam estas
„Vampir' sangotrinka kaj ekspluatanta;
„Hom' mortas; mi mortas; natur' sola restas —
„Eterna reĝino, demon' aroganta!

„Pensad' mia mortos... kaj korpo... mensento —
„Por mia pened', kaj labor', kaj doloro!
„Ne! Kun la Naturo ne estas konsento:
„Ni estas la sklavoj, — ĝi estas Sinjoro!"

Li mortis... ekkuŝis la korpo en tero,
Ili plantis sur tomb' lia verdan salikon...
El korp' lia suĉas ĝi vivon somere,

Kaj diras al floroj, al suno, al vento,
Ke ĝis ja estas eterna konsento
De l' Reĝo-Naturo kun Hom' malamiko...

Cz. Kozłowski.

Funebro.

Mi estis hodiaŭ en via ĝardeno,
Mortinta amiko vi mia.
Belege ekfloris la blanka jasmeno
Kaj via amata lilio.

Per ĉiuj petaloj siringo nun bluas.
Sun' brilas en via ĝardeno.
Kaj super folioj de la rozmareno
La kant' najtingala trafluas...

Kaj ankaŭ mi vidis en tiu floro
Amatan kuzinon la vian...
Paliĝis la vangoj. Kaj kap' sia kara
Kliniĝis sur kolo gracia.

Kaj ŝiris ni rozon, ni vidis ĝin brili,
Kaj sentis la ravajn odorojn.
Ni ŝiris violojn, kaj pensis pri ili,
Ke ni plektis tiujn-ĉi florojn.

Kaj plendis ŝi, kiel malgaja liuto,
Nu, rememorante, amiko...
Kaj iris miksiĝi larm' ŝia kun guto
de roso en roza kaliko.

Cz. Kozłowski.

Vilijano.

Ce Kampoŕ al vilji ires jev Kampoŕani
Cu la mano li henas Jalčirov.
Šitkovrigis vizaj', lacegôis lemań,
Kaj okulo ne hevas jaw brilov.

Mojâu je Kvar hoi, dum melvano, mallun',
Iris rec li Jalči la horlov…
Rec pro lacegôi preskaû Krevo Koi' – dum
Laste penso polesa la cerbov.

Poste en sunvoruj', ĝis vesper' de maleń
Li ripas la stonaw parimov;
Lacegeo mortigos la Korov, – Kaj jev
Laste senso polesa animov.

Kun sembrila okul', Kun la cob' sen Kousci',
Preskaû brilaw havante jam Korov,
Kunprenitа hakilov el dom', iras li
Cu la nokto mortigi zinjorov.

Morgaŭ venos el urb' kvar soldatoj kun arm',
Ili trovos krimulon subite ...
Per ripbatoj je dors' lin dengos ĝendarm'
Ekkonfesi la krimon faritan.

Kaj post jam restad' en malpura karcer'
La juĝistoj dekretos kriele:
Por la krim' de mortig', enforĝitan en fer'
Siberion lin pelu piede.

Kun vundita pied', kun sur dors' sangostri',
Li sin trenos survoj' maŝinale ...
Kun timiga obstin', li ripetos al si
„Al mi restos ja tute egale".

Cz. Kozlowski.

Efemeridoj.

Freŝon kaj bonodoron
Spiris flor' dum somero.
Sed alvenis aŭtuno
Kaj ŝanĝiĝis vetero.
Ĉesis brili la suno,
Vent' malvarma ekspiris,
Kaj feliĉo de flor'
Foriris ...

— — —

Mi posedis trezoron,
Estis ĝi iluzio.
Sopir'... Venis la sperto,
Senindulga fino.
Kaj ŝanĝis mi certe.
Ke mi vane sopiris ...
Kaj feliĉo de kor'
Foriris.

Cz. Rozłowski.

Prusy. 15-VIII-11.

Sovaĝaj floroj.

Baldaŭ vi iros al mondo prozama,
Mia revoj' fantazia!
Vi tiel simplaj, tiel senornamaj.
„Sovaĝaj floroj" vi miaj!

Mi vin kreskigis en stepo mizera,
Stepo vasta, senlima —
Tiel sengaja kaj tiel severa,
Kiel mem mia animo.

Vin ne freŝigis de l' pluvo la larmoj,
Vin bruligadis la suno, —
Tial vi kreskis malĝojaj, senĉarmaj
Kiel la tag' de aŭtuno.

Sed mi vin amas, floroj sen ornamo,
Simplaj kaj melankoliaj...
Per ia stranga, kompatema amo.
„Sovaĝaj floroj" vi miaj.

Cz. Kozłowski

Tataro en malliberejo.

Mi nek ĝuis sufiĉe junecon,
Nek sufiĉe la varmon de l'amo,
Nek elspezis la tutan kuraĝon,
Malamikojn pafante la slavojn!
Por mi venis la tagoj aŭtunaj,
Min sklavigis idoj de sklavoj!

Hej vi, filoj de sklavoj, kristanoj,
Senkuraĝaj, timemaj vi hundoj!!
Ne subiĝos al vi step-infanoj;
Nur atendu: saniĝos la vundoj.
Kaj aperos denove Tataroj
En Ukrajno, sur viaj stepoj.

Ne forgesos ĉevalo pri selo,
Ne forgesos lancist' pri trumpeto;
Sole estas la Di' en ĉielo,
Mahomet' estas Lia profeto.
Mahomet' tiujn ja ne forgesas,
Kiuj lian instruon konfesas.

Mian Sultan ornamu sagajo,
Venis tiam la tri de repago:
En Rusujo, Ukrajno, Polujo.
Koron pikis de mi ĉiu sago;
Kaj ĉi tiu mortanta koro
Estis paŝ' por sklavig' de Tataro.

Hej lepoj junuloj vi, slavoj!
Poloj, Rusoj, Kozakoj — kunul'idoj!
Vi akrigu ponardojn kaj glavojn,
Ni pintigu nur sagojn kapiklajn.
Ĉiu sago ofigu infanojn, —
Vidvinigu virinojn Kristanajn.

— — — —

Malproksime de stepo libera,
Sen ĉeval', sen pafarko fidela —
Velkas mi en malluma kaverno,
Katenite, kun kor' ribela.
Ĉenoj foras premsignojn sur brakoj;
Tiujn stiojn repagu Kozakoj.

Kaj ŝi mia ĉevalo alaŭa,
Ĉu ŝi kuras tra stepo-kamparo?
Ĉu ŝin kaptis venĝema kozako,
Post perfido, aŭ nuo barbaro?
Aŭ en ŝin melĝojaj aŭtuno
Kaŝiĝis blankiĝas jam suno!

— — — —

Restas mia patruj' - stepo vasta,
Mia lito - la ŝtorko mizera,
Kaj preĝejo - arbar' tiu ĉasta,
Melĝojega - mejesta - severa,
Ĉar restantas de l' tempoj pravaj:
Venas ŝin nek kundoj, nek slavoj.

Ne penetras ĉe ŝin la vento ...
Tie sternas mi preĝ-tapiŝetoj,
Kaj turnite al sankt' Oriento,
Mi alpreĝas kun pio profeton.
Kaj la arboj similej al reĝoj
Ripetadas por ĉiu la preĝojn.

— — — —

Mi nek ĝuis sufiĉe liberon,
Nek sufiĉe junecon amoran,
Nek sufiĉe vigligan aeron
De l' stepo – nek ankaŭ steparon.
Sen mi ĉasas junulaj. Kaj kevojn
Foras por kapti lupojn kaj ŝlevojn.

La leporo, tra stepo kurante,
povas esti nun tute trankvila,
Halti eĉ en la step' arogante,
Ne rapidi al kaŝejo malhumile:
Maltrafante neniam sagisto
Estas sklav' de la anoj de Kristo.

Nun, rajdante tra stepo, kozako
Ne returnas la kapon kun timo,
Kaj trankvile manĝigas el sako
La ĉevalon en stepo sen limo:
Maltrafante neniam sagisto
Estas sklav' de la anoj de Kristo.

Tamen venos la hor' de ribelo.
La alekow anoncos trumpeto;
Sola estas la Di' en ĉielo,
Mahomet' estas lia profeto.
Ili faros ĝin: bravaj tataroj
Reeĥos sur slavaj stepoj.

Cz. Roztowski

Rijów, 3-X-1911.

Liro.

Liron tenas mi en mano,
  Senutilan liron...
Ĝi en kor' nedifinitan
  Vekas nur sopiron.

La juneco iam pasis,
  Pelis mi sopiron,
Kaj al mondo mi frakasis
  Senutilan liron.

Cz. Kostowski.

Sun', ĉejano, kampanolo!

En Ukrajno kampoj verdas.
Inter kamp' vilaĝo mia.
En la stepoj vid' sin perdas,
Balanciĝas herb' gracia.

Brilas sun' sur florkalikoj.
En arbar' ĉejanpopolo,
Sol' briletas inter spikoj —:
Sun', ĉejano, kampanolo!

En Ukrajno la knabinoj.
Estas belaj kiel floroj.
Kaj graciaj kiel pinoj.
Freŝaj — kiel ros-odoroj.

En vizaĝo suno kuŝas.
En okuloj — kampanolo,
Ridas ĉiam lolo buŝo —:
Kampanol', kaj sun', kaj lolo!

Cz. Kozłowski.

Du floroj.

„Est-il le meilleur?
„Celui: il fut le moins aimé".

En bonega, grasa tero
Kuŝis roza semo;
Mi ĝin flegis ĉiutage,
Flegis kun amemo.

Ne elkreskis mia rozo!
Pasis la somero.
Kaj trafosis mi la tutan
Lokon pro kolero.

Pasis vintr'. Alvenis majo.
El sub neĝ' tavolo
Ne petite, ne flegite
Kreskis blanka-primolo.

Cz. Kozłowski.

Tagiĝo.

Dediĉita al S-ro Tadeum Ficowski.

Ĉielo nigra fariĝas jam blua.
Malaperante, orienta steleto,
Per la okulo radias kokete...
De l' sun' leviĝas jam brilo unua.

Sur blua fono radias betulo...
De l' sun' pelate, jam devas forir',
- Sed ne ĉesante ĝemi kaj sopir' -
Blanka fantomo - la luno migrulo.

Grizaj nubetoj traflugas aeron...
Jam najtingaloj komenciĝis kantoj.
Venteto milda karesas riveron...

Sur ĉiu herbo kaj sur ĉiu flor'
Brilas roseroj kvazaŭ diamantoj...
Alvenas tag', ĝojiĝas la kor'!

Cz. Kozłowski.

Letero de Brundo.

Botzif, 3 gustul, 1913 yel.

Zendeli gudik, flen obik! Jen mi havas honoron sendi al vi lastan frukton de mia volapükemiĝinta (uff!!) inspiro... Almin ĝin!

Se la inspiro penus forvoros min kaj se vi esprimiĝos esti inklina por akceptadi similajn „poeziajn" — mi kun plezuro servos.

Volapükajn salutojn sendas al vi

Brundo (Blonik-men).

Deli gudik!

Vomül Blonik-Brunozo.

* * *

(à la Lemaizlzi).

Amoraj tempoj pasis for.
Nun ĉe alia mi labor',
Denove forte batas kor',

Denove freŝa emoci' —

Fajf' korturŝila, same ni…
Ĉesis Bombeja idili'.

Nur kora unu ni amik'
Ni brikon metu al la brik'
(Nenio estas „fikulik'").

Ĉe Volapükon sen la pen'
Ni ja elternos ĝis kompren' —
Kaj ni „absurdo" kor „flen".

Do nur antaŭen kun koraĝ';
Bela atendas nin vojaĝ':
„Mesia" jam en malproksimej'!

Ni ensipiĝas … (Kia ĝuj'!)
Antaŭ ni strias luma voj'.
(Fajfo! ne kriu oj, oj, oj!)

Vento jam ŝveles sub la vel'.
„Ŝipo" vojeĝas al la cel' —
Ni ĝin atingos „ole sol".

Nur por kun vana la Krilik'!
Romanco ĉiam „fikulik”,
Sed la estonto ja „absik”.

Nun estimataj „läds e söls”,
Ni pluas jam sur onda rels' –
Lesto romano el Wells.

Ĉar kiam venos fine ni,
Fajf' estos „lidel”, „macel”-mi
Kaj ni nur „pükos”:
– si, söl – si!”

Blonik-man.

Botrif, 3 gustul, 1913.

Ĉe Sinjoroj Repsch.

La 7an de Septembro 13.

Brunoza

Lia moŝto Eska.

Koro al Nestoro.

8 de Septembro.

Al forgezinta pri ni Nestoro, sendas Korajn salutojn la forlasitej ofoj.

Borko.

Korajn salutojn al estiminda S-o glordonanto sendas ...

P.S. Ĉu forte vi estas tuŝita per la plej nova „sensacio" – de S-o Antoni? Brunulo.

Petalo.

Ni sendas al vi la unuan potrefon de rezidejo de la sanktmemorata „Poeta rondo" kaj same plej korajn salutojn...

(poŝtkarto: „Mogiła samobójcy")

Simono.

Ex-ojciec plus rożne rozbitki byłego Koło-Welodw. saluteys pierworodnego.

Krome, ankoraŭ estis sendita salutoj korajn al sekvantaj personoj:

Napoleono en Łack,
Mimoro en Noworadomsk,
Nina en Częstochowa,
Sklenička en Praha,
Eberstein en Soest,
Bombaĉo en Varsovio,
Lany-Lango en Varsovio
Nikodemo en Strelitz.

Subskribis:

Brunoza, Nina, Sunuto, Leska, Rimanto kaj Fajfanto.

Al Brunulo.

Ŝtrikanta nunvanilo!

Venu tuj

Fajfantejon, kie vin atendas du surprizoj.×

Rapidu, flugu!

Fajfanta.

14/9 1913.

× Eska kaj Simono.

[redacted]

Recenzo pri „Aŭtunaj floroj" en „Lingvo Internacia". Aŭgusto, 1913.

En antaŭa recenzo de alia verko de S-ro Schulhof oni gratulis la verkiston, tial ke li (rara avis) faris versojn unuavide kompreneblajn. Ĉi tiun kvaliton montras ankoraŭ la aŭtoro en la nuna kolekto de dek originalaj poemoj. Kelkaj el ili jam aperis en diversaj gazetoj, kaj la legantoj de „L. I." kredeble ankoraŭ memoras la bongustan kaj samtempe agrablan „Recepton por fari bonajn versaĵojn". Ĉi tiu poemaro estas bona enirbileto en la Parnason, kaj danke al ĝi la poeto ricevos certe la laŭrojn deziritajn en la antaŭparolo.

N. K.

Letero al Boroko.

Łódź, 14 de Septembro.

Kara Samideano!

Supozeble vi jam estas ricevinta mian kolektivan karton, kiu certe mirigis vin, sed ankaŭ, mi esperas supozi — ne faris grandan malplezuron.

Ŝajne estas al vi, ke ĉiu granda homo aŭ pretendanto al tiu nomo, ne amas skribi leterojn; tamen

danki al la pliforte ekscito ĉe plejgranda malaboremulo devas skribi.

La sendita al vi karto estis la frukto de la kolektiva ekscito, same ankaŭ kiel ĉi tiu letero. Ne pensu tamen, kara samideano, ke nur sub influo de amika samideano-rondo mi rememoras pri vi - mi jam delonge intencis skribi al vi private, sed ĉiam la skribinspiro ne favoris min. La ĉiutagaj zorgoj ankaŭ estis kaŭzoj kiu malebligadis ofte preni plumon en la manon.

Kiel vi jam scias el antaŭa karto, mi nune vivas en Varsovio pli ol de duonjaro, kie mi daŭrigas la komencitan en Krakovo praktikon. Krom tio vespere mi vizitas teknikajn kursojn, kiuj daŭros ankoraŭ du jarojn, post kiuj mi veturos ankoraŭ por unu jaro Francujon por fine plenigi tiun mian celon. per helpo de iu ŝparo, kiu ebligos al mi ekstari sur fundamento. De tempo al tempo mi vizitas Lodzon, kie konversante kun malnovaj amikoj, mi travivas en intima rondeto la pasintecon. Antaŭ niaj okuloj traŝoviĝadis tiuj tempoj de freneza entuziasmo; tiuj tagoj dum kiuj ni okupiĝis de piedoj ĝis al kapo per nia ideo renovigadi la mondon.

Mirinde estas, ke ĉiam en tiuj rememoriĝoj inter-

paroloj li ĉiam montriĝas antaŭ mi en aŭreolo hela, montriĝas li, sen kiu mi ne povus imagi al mi nian literaturon en tia stato, en kia ĝi nune troviĝas. Krom tio lia persono mem, staras en mia memoro kiel ekzemplo de de esperantisto, kio igas min ĉiam almenaŭ per kelkaj vortoj esprimi al li mian admiron, admiron al homo granda. Profitinte do denove en mia amika rondeto, mi skribas ĉi tiujn vortojn, esperante, ke li neniam ŝanĝiĝis kaj plu faras ĉion eblan por disvastigado en kia ajn formo de nia afero, des pli en tempoj nunaj, kiam en febra ekscito vivas tuta mondo, kiam ne multe da personoj atentis nur postaĵoj.

Bonvolu do respondi kaj certigi, malgraŭ ke mi tute ne dubas, ĉu vi fervoras sur kampo de nia afero.

Ne pensu, kara samideano, (kara samideano) ke mi volus kredi vin nekredebla, sed mi havas vian celon por viv-no perdon nia afero. — La famo ĝis nun nur inter mi Ŝajnante de du jaroj jam laboras prezenti al esperantista mondo surprizon. De du jaroj li jam kolektas materialon por siaj kronikoj kaj da materialo li sukcesis kolekti jam kvar dikajn volumojn. La enhavon li ĉerpas el nia privata korespondado kaj ĝenerale el la intimaj rilatoj

kun diverslandaj esperantaj verkistoj. Tie ĉi trovos diversajn interesajn dokumentojn koncernantajn la intiman vivon de niaj pioniroj aŭ kandidatoj por tiu titolo. Diversajn konfidenciajn leterojn koncerne iliajn opiniojn pri nia esperanta vivo k.t.p. La volumojn beligas ankaŭ multaj grupaj fotografaĵoj, kaj portretoj, desegnitaj de Fajfanto kun natura al li gusto.

Nun divenu, kiun li volas fari la heredonto de kreskanta ankoraŭ kroniko?

Fajfanto diras ĉiam, ke „en esperantujo ekzistas nur unu homo, kiu povus fari iom el nia kroniko" — kaj tiu homo estas vi. Fajfanton ĉi tio ne senkuraĝigas ke tia kroniko, danke al multaj niaj kaj de Leszi, estas dense tavolita per pornografiaj versaĵoj kaj leteroj. Komprenble, Fajfanto esperas, ke tion la mondo ne ekscios.

Esperante ricevi de vi baldaŭ sciigon, mi restas

ĉiam la sama

Leska.

<u>de Brunulo.</u>

Kara Samideano! Kvankam nekonato de vi, mi ankaŭ rapidas alveni per kelkaj vortoj

saluti vin, estimata samideano, kaj ankaŭ komenci pli proksimajn rilatojn, kio estus por mi granda plezuro kaj honoro. Bonaj kaj konsciaj esperantistoj estas tre malmultaj, kaj nepardonebla kulpo estus, se ili almenaŭ de tempo al tempo ne interŝanĝus la opiniojn kaj ne konus sin reciproke. Tial estus al mi tre plezure ricevi de vi baldaŭ respondon kun sciigo pri via nuna vivo kaj faro! Dume akceptu korajn salutojn de

sindone via

Stan. Braun.

<u>de mi.</u>

Estimata Samideano!

Aliĝante al la komuna letero, mi ankaŭ korajn sendas al vi kelkajn vortojn. Danke al laŭda, kvankam ankaŭ ne tute meritita, reklamo, kiun faris al mi Lesko, mi esperas ke de nun mia persono ne estos por vi tute indiferenta kaj ankaŭ ĉi efektivigos mian kelkjaran revon kaj vi fariĝos ĝis iu tempo almenaŭ la konstanta korespondanto de mia kroniko, kiu estonte estos por vi destinita (se komprenble vi volos akcepti). Por komenco estus por mi granda plezuro kaj honoro, se vi bonvolus doni por mia modesta ido (Brunndo

asertas ke ĝi estas adultdevena /- ĉiam fotografajoj. Ulle ĉi ne opinio malbonan troŝ nian portretoj inter la „mestoj" de mia vendeto.

Konservante la komunan esperon mi ankaŭ atendas apellan respondon kaj ankaŭ la plenumon de mia modesta peto.

Koreĉi

Pajfanto.

Letero de Nestoro al Brunulo.

Pardubice, 12 Septembro 1913

Koraj samideanoj, amikoj kaj kolegoj!

Mi resolute protestas! Mi veniam forjesis kaj ankaŭ veniam forjesos. Ĉiutaje mi atendis respondon de Ĉeska, al kiu mi sendis la deziritajn libretojn kaj poŝtkartojn en Varsovion, sed mi ne forgesis ankaŭ miajn Lodziajn, al kiuj mi ĉiele jam longe ne skribis, sed pri kiuj mi ĉiutage pensas. Sed por la protesto kaj faru ĝi lokon al mia granda ĝojo, ke vi ĉiuj troviĝas sub viaj Lodzaj hejmetoj, kaj ke mi povos komenci vee miajn laborojn, pri kiuj mi revis. Ankaŭ al vin renkontis la konata sortobato. Nun feliĉe ĉio jam forpasis, kaj mi ankaŭ

denove min atingos en vian rondeton. Mi mem ne estas jam plena idealplena revulo, sed mi ne estas jam ankaŭ ĵena trompitulo kaj desperantulo. La pasintaj monatoj mi konvinkigis ke homoj (kaj speciale esperantistoj) estas nur malfortaj homoj, sed ke mele la ideoj estas ĉiam la samaj, ĉiam puraj kaj ĉiam junaj. Mi preskaŭ malamas tre multajn esperantistojn, sed tamen mi pli kaj pli adoras nian ideon, kaj al ĉiu ideo kun vi nee laboro estas por mi ĉiam plej granda plezuro. En Bern mi estis, ankaŭ en Stuttgart kaj ĝis al sateco unis nian esperantujon. Dume vin ĉiujn kore salutas via sindona

Drolt. Schulhof.

Letero de Boroko.

Krakovo, 20 Septembro.

Tre estimata Samideano!

Malfacile estas por mi respondi tuj al vi ĉiuj tri, mi komencas do de vi, lasante Eskaŭn por la fino, ĉar al li mi intencas ŝuti iom pli longe.

Via komuna letero, sed precipe tiu de Eskaŭ, ĝojigis min treege, sed samtempe tre ĉagrenis. Ĝis ia grada ĝi

estis konscienceriproĉo de mi kiel Esperantisto.

Kara Sinjoro! Ŝajnas al mi, ke vi ĉiuj ekhavis pri mi tre falsan opinion. El la letero de Valter mi vidas, ke Vi supozas en mi talentan literaturiston, homon providencan, kiun bezonas la germana verdstela literaturo. Antaŭ du jaroj mi tion saman supozis. Feliĉe tamen por mi, mi eksentis mian malkapablecon kaj senpovon jam antaŭ du jaroj per la iom akriĝita de mi kritikemo koncerne mian personon kaj rimarkinte tion, mi ĉesis nigrigi la paperon. Ĉio-ĉi, tre malmulte cetere (kaj feliĉe), kion mi skribis, estas tiel senenhava kaj tiel senvalora, ke estus domaĝe daŭrigi. Kaj tio, kion mi verkis (!), estas ĉio, kion povis mia cerbo akuŝi. Plibone mi ne povus. Ĉu do ne preferinde estis, eĉ kun bedaŭro, forlasi la turnirkampon?! Depost pli ol unu jaro mi nur tre malmulte okupiĝas pri Esperanto (tial la konscienceriproĉoj vekitaj per via letero), aktive tute ne, nur iom mi legas kaj de tempo al tempo ĉe okazo interparoles kun la krakovaj konatoj. De la aktiva militisto mi transiris al la rezervo, eble iom tro frue, sed certe pardoneble, ĉar la fortoj ekmankis.

Pri la pasintaj kelkaj jaroj de mia agado esperantista,

mi konservis tre belajn rememorojn. Tiuj tagoj de Ferrara, preskaŭ freneza agado aŭ pli ĝuste plezuro vagadi, estis la plej belaj, kiujn mi havis kaj certe havos en mia vivo. Kiom da esperoj, iluzioj, ĉarmaj momentoj! El ĉio ĉi restis nur espero, ne, kredo pri la disvastiĝo de Esperanto, bedaŭrinde sen ĝiaj altaj, homaranaj ideoj.

Post ĉio ĉi supre dirita, ĉu do miriĝos vi, ke mi simple rifuzis akcepti iam pli gravan rolon en la de vi preparata verko.

Nune mi ne tre bone komprenas la specon de via verko, kaj poste mi ne sentas min sufiĉe kapabla por iun ajn krei. Mi estus tre feliĉa, se mi povus servi al vi per ia helpo, se vi ĝin bezonus, kaj se ĝi iom utilus, sed eĉ pri tio mi tre dubas. Eszew estas kulpa pri tio, se li vin trompis pri mia persono, montrante ĝin en tro hela lumo.

Vi postulas mian fotografaĵon por via verko. Ĉu sen ĝi la „Kroniko" ne povus ekzisti? Ĉu ne ekzistas pli indaj esperantistoj? Se vi volus plenigi la verkon per fotografaĵoj de tiaj ankaŭ kiel mi, vi devus kolekti kelkajn miliojn, pri kiuj vi ne scias, same kiel, krom kelkaj afablaj konatoj, neniu scias pri mi en la mondo esperantista!

Se vi tamen nepre deziras enpresigi mian nomon en via verko, sufiĉus ne pli ol du linioj: „Kuhl (kelkaj artikoloj subskribitaj „Boreo") ne malbona stilisto. verkis kelkajn poemetojn kaj recenzojn, tradukis „Legendojn" kaj kelkajn novelojn". Estas pli ol mi meritas kaj je 18 vortoj pli ol mi pretendas.

Tre malagrable estas al mi, ke tiu ĉi letero vin iom seniluziigos, sed mi ne estas kulpa pri tio. Mi tre ĝojos, se malgraŭ tio vi konservos por mi viajn amikajn sentojn kaj bonvolos min honori per informoj pri viaj agadoj kaj verkadoj, kio min tre interesas. Miaflanke mi petas, se vi tion bezonus, helpi vin per tiu aŭ alia detalo. Kvankam jam antaŭe mi scias, ke mia deziro estas pli granda ol la povo kaj scio.

Sendante tre korajn salutojn mi restas

Kun alta respekto

Br. Kuhl.

<u>Koro de Rimanto.</u>

Piotrków, 21 de Sept. 13.

Kara mia instruanto! Że jesteś leń do pisania wszystkiego prócz Kroniki, który już piszesz tom 3ci, to już pow-

szczerze wiadomo! Ale że nie odpowiadasz na moją Kartę, pisaną po esperancku, to można tłumaczyć no!.. chyba ..... straszliwym zamiłowaniem do Ido. A że to fripon! szykujesz pewnie jakiś zamach na Esperanto! Wiedz, że dotychczas propagował 148 innych języków międzynarodowych, ja zaś wkrótce przestanę esperantystą (będę większym Katolikiem jak sam papież w Rzymie – dopisek listonosza).

Aby cię ukarać, przesyłam Ci Kartę z nudną lekcją Ido. Z powodu powyższego wypadku zamiast Brunnera umieszczona jest jakaś białogłowa, ludzie bywali zdania: „cherchez la femme!" i może mają rację! Jeżeli mi i na tę Kartę nie odpiszesz, to wiedz, że zemsta moja będzie straszna, przyślę Ci każdego samego buba ziedącego na dwóch stronach odrazu. Czego z całego serca życzy

Twój fidela servanto.

Rimanto!

Letero al Rimanto.

Lodzo, 25 de Septembro.

Kara mia Roma Ultra-Katoliko!

Tuj en la komenco mi komplimente devas diri al vi, ke en la oko de konjektado vi estas vera fuŝisto!

Vi opinias min studanta Idon. Sed jen korŝire devas mi al vi konfesi, ke nek mi studas Idon, kaj nek mi tion faras kun Brunulo aŭ eĉ kun alia via "fenne", nek mi planas la perfidon de Esperanto – mi nur.... dronis en la "Trilogio" de Sienkiewicz.

Ĉu vi do min miras, ke mi ne tuj respondis al via "esperante skribita" poŝtkarto? – Nur via dua, alarma, karto eltiris min sur la supraĵon de la diluva dronejo kaj igis min malgraŭvole preni la plumon en la manon.

Tiun "igon" mi devas konsideri kiel "perfort-igon". Por ĉiaspecaj perfortigoj en ĉiuj civilizitaj landoj ekzistas severaj punoj, nur sole la speco de la ĵus okazinta estas ekster la leĝo. Mi do devas mem serĉi konvenan punon. Ĝi estu do: perfekta eklerno de Esperanto!

Via karto estis tiel "senerara", ke mi, sincere mi estis kiel novnaskito – intencis jam ŝtoniĝi pro granda ravo kaj admiro. Pripensinte tamen, ke ne valoras pro tia bagatelaĵo iĝi ŝtono, kio estus neimagebla perdo por nia Esperantujo (pro kaŭzoj al vi bone sciataj) – mi rezignis de tiu bona maniero, kiu neniel influus nian konon de Esperanto kaj mi decidiĝis al alia.

Jen vi per poŝto ricevos la sensacian kaj epokan

verkon de Sinjoro Antonio Copernicus „La Parnaso de papagoj". Por tiu ĉi libro vi devas en daŭro de unu monato, komencante de la hodiaŭa tago, perfektigi viajn konojn de Esperanto ĝis al tia grado, ke via lingvo estu egala al tiu de la majstro Copernicus mem!

Se vi ne sekvos tiun mian „humilan" ordonon, mi rompos kun vi ĉiujn absolute rilatojn.

Infidos.

Letero de Leska.

Varsovio, 21 de Septembro.

Mi havas la honoron sciigi al vi tre ĝojigan novaĵon kiu vin certe feliĉigos kaj kiu por tuta Esperantujo havas grandan signifon — jen ĝi:

Sinjoro Leska, antaŭ poeto, kiu posedas apartan paĝon en nia literaturo kaj kiu, laŭ siaj propraj vortoj, ĉesis okupiĝadi pri poezio, denove eniros sur esperantan Parnason por ekokupi tie konvenan por li lokon.

Mi scias eĉ pli multe: laŭ siaj propraj vortoj, li neniam ĵetis poezion, nur personoj, envantaj al li gloron kaj laŭrojn, profitante lian tempan okupitecon kaj eliĝon por iom tempo el esperantaj redakcioj pro tute privataj aferoj,

disbuonis en tuta Esperantujo tiun malnoblan paskvilon.

Nune via fama letero estas jam liberigita de l'honora vorto kaj ne plu silenta, do – trovu la malnoblaj mensogantoj antaŭ via venĝo.

Stanislavo Seltrankeviĉiĝis.

<u>Letero de Simono.</u>

Varsovio, 23 de Septembro.

Kara Fajfanto.

Rememorigante la momentojn de lasta vizito, mi rapidas saluti Vin de ĉi tie, Kara, kiel foran membron de l'a junulara „Zloto-Walst".

Alveninte Varsovion mi, post tagmanĝo, decidis viziti la Majstron. Trovinte lian adreson, mi* eniĝis la tramon № 0 kaj veturis ĝis la strato Dzika 9. Sur pordego, la kuraĝo forlasis la brustojn de miaj amikoj. Ni konstatis nur, ke sub № 12 troviĝas la hejmo de Ludoviko Zamenhof.

Reen per № 0 – redakcion de „Pola Esperantisto".

La redakcia dio S-ro M. Czerwiński akceptis nin kiel „simpatiajn gastojn".

Lia sekretarino kaj lia patrino preskaŭ mortigis nin per siaj nur aspektoj... De maldekstre enfluadis longe

odoro de tagmanĝo .... Mi komprenis la situacion. Post kelkaj minutoj mi forkuris, konduktataj per la anĝela rideto por la „simpatiaj gastoj".

Tamen mi mem profitis multe de tiu vizito. Aŭskultante, mem senvorte, dum la interparolado mi konstatis, ke eĉ unu vorton mi forgesis, de tiu tempo feliĉa (2 jaroj) kiam mi lernis, plenove, pri la afero.

Tiu ĉi letero estas mia unua privata skribaĵo en lingvo esperanta. Ĝi estas tute sen vortaro „originale verkita".

La folian leteron por via kroniko mi protiĝos dum la plej proksimaj sekvantaj tagoj.

Nun mi premas vin al mia fidela brusto restante ĉiam

la sama Simono.

P.S. Salutu la vilaĝon.

(* Brunulo kaj kelkaj)
F.

Letero al Simono.

26 de Septembro.

Mia Simono!

Vian leteron mi dankeme ricevis kaj senpacience atendas nun la aviziton pri la „skizoj", kiun enmigratan en mia Nekropolo.

Kun ĝojo mi konstatas, ke, dank' al viaj skizoj de teatro

vizitoj de miaj malnovaj nestoj, la Kroniko iom skribis, ĉar venis mil leteroj jen de Vi, jen de Leska, de Rimanto kaj ankaŭ de Borsko, kio kaŭzis, ke mi komencis min senti en mia elemento.

Krom tiam dolorigas min tre la manko de poezia materialo, mi tamen esperas, ke ambaŭ miaj amikoj-bardoj Leszi kaj Leska rememoros ĝin pri siaj altpontaj deroj kaj feliĉigos ĝin per tiu neesperdutan ~~Por~~ Kronikiston per iunelej sonetoj, kvarversoj, sekstetoj kaj rejej oktetoj.

Mi tre ĝojas, kara Simono, ke en ĉi vekiĝis la dormantaj fajreroj de l'iama esperantisteco, kies bona pruvo via lasta skribaĵo, kiu, escepte kelkaj lokoj, estas tute modela.

Kiel mi estus fiera de mia patreco, se tiun leteron pri la „ŝtikoj" baldaŭ sekvus dua kaj tri, sed jam esperantaj kaj samkaj spritaj, kiel, certe, la venonta pri la „ŝtikoj" de la sekvonta „Złoto-Wełot Kurator mtodziej meskiej".

La promesitajn fotografaĵojn mi preparas, sed pro ~~[illegible]~~ foresto de l'suno, la laboro iras tre malrapide antaŭen. Mi povas kopii nur dum la tagmanĝoj – unu horo, dum la kopioj postulas po kelke.

Estu do iom pacienca!

Ĉar estos al vi eble malfacile trakti mian ŝminejon, mi do konsilas al vi viziti Lestkon, kiu instruos vin kiel deĉifri mian skribon.

Akceptu la patran benon!

Pajjenko.

Letero al Borovko.

27 de Septembro.

Tre estimata Sinjoro Generalo de Vrenevo!

Grandan konfuzon kaŭzis al mi, modesta membro de „Komisio pabovena" via honoriga letero, en kiu vi sugestas, ke mi povas fari „verkon". Tio estas des pli konfuziga, ke la efektive en tiu okazo falsa opinio de Lestko ne povas esti konfirmita per iaj publikaĵoj kiu permesus iom similan de mi esperi. Tamen antaŭ al mi ĝuste vin informas pri la speco de mia „verko" mi sentas min en devo sincere sed ne malpli energie protesti kontraŭ via tro modesteco, kiu tamen akcelas legadon de viaj recenzoj kaj tradukoj kiuj vi povas eraraĝi.

Also, miajn testamentajn intencojn mi tute ne ŝanĝas kaj same forte kredas, ke el tiuĉi rekruta

„Laŭtaŭajstvo", kiun mi de dujaroj kun sankta pacienco kolektas, vi scipovos formi almenaŭ unu bonan regimenton, kiu sen honto povas kaj povus povos iam paradi sur la batalkampo de esperanta literatura brilado.

Ĉu, mi ne povas preterlasi la okazon prezenti al vi la materialon, el kiu vi iam laŭ via plaĉo povos elekti kaj kunmetadi. Mia „Kroniko" tute ne estas verko, ĉar la verko nepre devas prezenti tuton – dum miaj kajeroj prezentas la amasiĝon de diversaj bezonaj kaj nebezonaj diversaĵoj, kiel ekzemple: artikolaĵoj, recenzaĵoj, poeziaĵoj, privataj leteroj, publikigitaĵoj kaj nepublikigitaĵoj, rememoraĵoj, impresoj, konfesoj, skizaĵoj, portretoj k.t.p. k.t.p. ĉion kion nur la sentemo kaj sentoplena lango de miaj amikoj kreis kaj kreas.

Krom la seriozaj artikoloj kaj leteroj pri Esperanto kaj esperanta literaturo, krom inspiritaj kaj sublimaj aŭtoraĵoj de miaj bardoj – vi trovos tiam abundecon de kabaredaĵoj aŭ anekdotaj de pli malalta speco „literaturaĵoj" ke la haroj ekstaras sur la kapo de ĉiu esperantista sentulo, kiu eĉ ne povas supozi, ke Esperanto en sia sublima fleksebleco estas tiel inklina al la senbrida kaj pomo-

grafia esprimiĝado.

Nun mi ankoraŭ volas aldoni, ke mia Kroniko tute ne celas okupiĝi pri ĉiuj pli aŭ malpli famaj esperantistoj, sed nur pri tiuj, kiuj estas, aŭ ŝajnas esti al mi pli proksimaj. Ne tiuĉi modestan volo vi ne estos unu el miloj kaj tial via portreto plenigos nur la solan ĝis nun mankantan lokon.

Rekomendante mian multpromesantan rekrutaron al la afabla favoro de via Generala Moŝto, mi restas

Sindone via

Gajfanto.

<u>Letero de Ĉeska.</u>

Varsovio, 8 de Oktobro.

Amata Simio!

Havu kompaton pri mi, mizerulo, kaj elvomiĝu per tia letero, kiun mi kun granda ~~...~~ vidonig rigardos.

Traniĝadu viaj infanoj-Kronikoj, rememoru al vi pasintajn tempojn, formanĝu ĉiajn bongustaĵojn, povas esti spinak po męsku, kaj venu, venu ĝis Keleij pajoj.

Al forsiplena bonvolu transdoni ĝisgekuan Kapo-Keinon.

Via Ĉeska.

Letero de Simono.

Varsovio, 10 de Oktobro.

Kochany Fajfrze!

Nazwij mnie jakim chcesz imieniem, z pośród bydląt chodzących po przeczenej krainie próżniaków i mazgicieli, ale nie wymagaj abym z mej wypuszonej do cna mózgownicy wykrzesał jeszcze cokolwiek na temat obiecany.

Już sam początek tego listu powinien Cię upewnić w słuszności mego usprawiedliwienia. Nie drę go tylko dlatego, że mi więcej nie dadzą papieru, a jest już dobrze po północy i kupić nigdzie niepodobna.

List Twój z podobiznami członków otrzymałem ku radości mej niezmiernej, przytem zdumiony byłem szybkością z jaką wykonałeś taką masę roboty.

Aby się choć w drobnej części odwzajemnić, przesyłam Ci mój konterfekt w ostatnich dniach sfabrykowany. Drugi egzemplarz zechciej wręczyć Brunowi. Niech ma chłop odemnie pamiątkę.

Z Leszką nie spotykam się. W Łodzi będę za 12 dni w przejeździe do Brzezin.

Uściskaj odemnie wedle własnego wyboru obydwaj

Symek

Letero de Borsko.

Krakovo, 8 de Oktobro.

Kara Samideano!

Kontraŭ obstineco ne ekzistas rimedo! El via letero mi vidas, ke nefacile estas ŝanĝigi vian opinion pri mi. Tial mi sendas la fotografaĵon, kun la peto, ke vi bonvolu lokigi ĝin iel sur la lasta kaj kiel eble malplej videbla loko.

Kaj koncerne la duan parton de mia plenumo de via postulo: ĉu mi scias, kion fari? Laŭ via letero mi prezentas al mi nune, ke vi deziras, ke mi faru sur la fundamento de la fontoj kaj materialoj de vi kolektitaj ion verkon. Nu, diru, tio tute superas miajn fortojn. Ĉar kion en ekstrema okazo mi povus fari? Kelkajn artikolojn, kritikojn pri kelkaj literaturistoj, pri la stilo, pri fleksebleco? Tro malmulte por via kolekto, tro multe por miaj kapabloj.

Jam mi intencis verki iom da pli grandaj recenzoj kaj kritikaj artikoloj kaj kolekti ilin en volumon (eble kelkaj serioj) sub la titolo: „Sur marĝeno" (de esperanta literaturo), sed ekzaminante la malgrandan kapablon mian, mi forlasis ĉi-tiun ideon kaj ne

plu daŭrigis la serion komencitan per „Dukorda liro".

Sed ĉe se tiun ĉi ideon mi denove volus efektivigi – tiaj „Kronikoj" estus ja tro valora materialo por ĝin uzi por tia malgranda celo. Do preferinde, sinjoro, observu iun alian por ŝarĝi tiun per la tasko, kiun vi sur miajn brakojn volus surmeti.

Krom la manko de kapabloj estas ankoraŭ alia por mi malhelpo: mi estas por unu jaro transportita Vienon; ne scias, kiam mi revenos de tie Krakovon kaj en Wien, tute mi ne havos la eblecon labori alime-niere, krom en mia fako.

El ĉio ĉi vi vidas, ke mi ne povas esti tiu „generalo", kiu el la rekrutoj faras oficerojn. Por tio ĉi devas esti Napoleono kaj troviĝi en feliĉaj cirkonstancoj. Al mi ĉio ĉi mankas.

La 13 12. n. mi forveturas Vienon. Se por vi mia adreso estus por io bezona, mi ĝin ĉi tie donas: Wien, Ottakring, KK. Tabakfabrik. Eble mi skribos al vi iom de tie, por pligrandigi per senvaloraĵo vian Kronikon, ĉu vi bezonus iam informon de mi – ĉu fine mi trovos por vi necesan generalon, sed efektivan generalon, ne ŝajnan.

Br. Kühl.

[illegible]

Kraków 8/10 1913.

Letero al Borotko.

Lodzo, 20 de Okt. [illegible]

Kara Samideano!

Ne nur kontraŭ la obstineco ne ekzistas rimedo — same kontraŭ la modesteco. Tial mi estas tute senarma. Tre malagrabla situacio por homo, kiu ne kutimis esti venkata. La satisfakcion mi faros por mi per venĝo sur via fotografejo, kiun mi lokigos ne sur lasta kiel vi deziris — lasta, sed sur la plej honora. Jes, efektive — „kontraŭ obstineco ne ekzistas rimedo".

Infektita per via modesteco, mi malgraŭvole faris malĝentilaĵon kaj tial, la plej koran dankon por la alsendita portreto mi esprimas ne sur la unua loko. Tamen mi esperas, ke vi tion pardonos al mi.

Nun mi esperas, ke via fatala „senvaloraĵo" de tempo al tempo troviĝos en mia modesta kroniko, ĉar vi ne forgesos ja pri ĝi se eĉ malfacile estas trovi al vi „efektivan, ne ŝajnan generalon".

Via

Fajfanto.

Simony. Simonides

Alaudo Cumlande

Stanisław Orły
n. Bnegi nure.

Brunulo

Jadeo

Lufido

Puzmernizigio

Van Griff.

Łódź, 2 November 1913.

Letero de Nestoro al Ĉesko.

Pardubice, 22 Oktobro 13.

Karega amiko!

Ĉar mi ne sciis ĉu Vi certe ricevos ĉi tiun respondon, tial mi skribas nur poŝtkarton. En la letero Vi ne anoncis al mi Vian adreson kaj en via jus alveninta poŝtkarto mi ne povas legi kaj diveni la nomon de la strato. Via skrib-maniero estas efektive stranga! Sed nun io alia. Vi priskribis al mi Vian nunan staton kaj vian rilaton al Esperanto. Mi ĝin tute bone komprenas, sed mia rilato estas tamen iom alia. Por mi fariĝis Esperanto kvazaŭ kunvojaĝero(?). Mi ne estas jam junulo, kaj tial mi ne povas kaj ne devas ŝanĝi miajn opiniojn kiel ekz. okazis ĉe Brutulo(?). Mi engaĝis nun jam per miaj fortoj (verkoj, paroladoj, kursoj) jam tiom por Esperanto, ke ĉiu mia retiriĝo estus kvazaŭ makulo en mia vivo kaj karaktero. Mi devas daŭrigi mian laboron, eĉ se mia entuziasmo ne estas tiel granda kiel en junaj jaroj. Mi devas ĉiam daŭrigi mian rubrikon en Osvěta Lidu kaj pro tio mi devas ĉiam kaj senĉese legi esp. gazetojn. Pensi pri ia afero, mallonge dirite min ĉiam okupi pri Esperanto. Mi tute komprenas Vian rilaton, kaj mi

ĝin eĉ laŭdas, ĉar la unua devo estas nun, pensi kaj okupiĝi pri la ekzistenco. Sed mi neniam povos kompreni la agadmanieron de kelkaj jam tute maturaj homoj, kiuj dum longaj jaroj subtenis kaj propagandis Esperanton. Kaj subite fariĝas Idistoj. Mi opinias, ke por ĉiu tiela konvertiĝo estas nepre necesa malbona karaktero. Tial, se mi eĉ tre radikale ŝanĝis miajn opiniojn, mi tamen jam eĉ ne devos tiri la kaleŝon en kiun mi min memvole jungis. La sola rekompenco por mia senentuziasma unua agado estas la konscio, ke Esperanto estas la lasta kaj sola solvo de via internacia problemo.

Kore via Dro Adullof.

<u>Letero de Boroko al Eska.</u>

Krakovo, 8 de Okt. 13.

Kara Esko!

Estas miraklo, se vi post la plej longa vivo kaj aŭskulto de „Centaj akordoj" ne fritiĝos en la plej profundaj abismoj inferaj pro tio. Kion vi al mi faris! Mi ne sciis, ke vi estas tiel sendanka, kaj kiel povis provo fari tion jam, vi min prezentos en tia lumo al viaj

amikoj! Alie mi ne estus verkaĉinta pri tiaj agordaj recenzoj!

Sed mi parolu serioze. Grandan malagrablaĵon Vi faris al mi, prezentante min al tiaj Lodz'aj Kunuloj, kiel talentan, kapablan verkiston kaj kritikiston. Ĉu vi mem ankaŭ eraris! Miajn kapablojn mi plej bone konas kaj tio estas la kaŭzo, ke mi ĉesis esti tiel fervora Esperantisto, kiel mi estis antaŭe.

Antaŭe ne konante ankoraŭ la limojn, vere tre malgrandajn, de mia talento, mi forte deziris alnesi al la komuna konstruaĵo de Esperanto kelkajn briketojn, por plirapidigi kaj ornami ĉi tiun estontan eble belan palacon. Mi iom komprenis la bezonojn de Esperanta literaturo sur diversaj ĝiaj kampoj kaj provis labori sur ili. Baldaŭ tamen montriĝis antaŭ miaj okuloj la vanteco kaj nenieco de miaj laboraĵoj. Mi komprenis, ke mi ne havas tian talenton, kiu povus esti grava kaj iom signifi por la estonteco de nia ideo. Tial mi ĉesis skribi, ĉesis labori aktive, kontentiĝante, ho kiom nevolonte, per la rolo de pasiva, ĉe okazo, uzanto de Esperanto.

Efektive jam depost unu jaro mi preskaŭ neniom

verkis, ĝis tia grado, ke mi eĉ perdis iom la facilecon en la uzado de mia lingvo.

Nun venis via komuna letero, kiu rememorigis al mi miajn iluziojn, kiujn mi volis forgesi (ĉiuokaze la rememoro de trompitaj esperoj por si mem ne estas agrabla) kaj kiu postulas de mi ankoraŭ, ke mi rekomencu denove la priverkadon.

Mi respondis al Fajfanto, kaj prezentis al li — ankoraŭ ne konante la specon de postulata de mi laboro — la necesecon de mia en ĝi partopreno. Lia respondo ankoraŭ pli min terurigis. Ĉar mi esperis ian kunlabor-adon, en formo de iaj konsiloj, klarigoj, korektado aŭ simile, dum mi vidas, ke li kolektis nur materialojn, fontojn, kaj proponas, ke mi iom iel ajn uzu. Nu, tio superas (pli ĝuste superis) miajn fortojn eĉ en la tempoj, kiam mi havis la iluzion, ke mia talento taŭgas por io. Fajfanto deziras, ke mi iom verku laŭ liaj materialoj; kion mi povas fari? Ĉu la plej bona okazo verki kelkajn artikolojn pri kelkaj personoj, pri la fleksebleco de esperanta stilo, pri ĝia literatura valoro! Pli mi ne povas, kaj tio kontentigos nek min, nek lin, nek la esperantistaron.

Celore nun mi ne havas tempon. Lunde la 13 X. m. mi forveturas Wien'on, translokigita tien por preskaŭ unu jaro. (Mia adreso estos: Wien-Ottakring, K.K. Tabakfabrik). Poste reveninte Krakovon, ankaŭ mi dubas, ĉu mi havos sufiĉe liberan tempon por [illegible] ion [illegible]. Se estus tiel, kiel ĝis nun, mi ne povus. Tro laciĝita mi estas per la oficado, tiel, ke mi reveninte vespere el la fabriko preskaŭ ne povas kolekti la pensojn.

Sed kara lesko, ŝajnas al mi, ke vi ankaŭ komencas malbone agi. Ĉu vi [illegible] vi sentis, ke vi vivas ofte per rememoroj pri pasintaj agoj, revoj, iluzioj. Tre malbona antaŭsigno. Ĝi pruvas, ke la periodo de viaj altaj flugoj jam finiĝas, ke nun ankaŭ la grizeco de ĉiutaga vivo trapenetras! Gardu vin, ĉar tio mortigas la agadon, veran agadon, kiu postlasas signojn por la estonteco. Kiam longe oni revas iluziojn, kiam longe oni kreas. Kiam komenciĝas la rememoroj, finiĝas la kreado. Estus domaĝe, se vi jam rememorus. Kiam mi havis la okazon ekkoni vian talenton, ĝi havas ankoraŭ tre multe por krei. Ĝi apenaŭ komencis burĝoni. Tial gardu vin, ke vi viajn burĝonojn ne velkigu.

por montri al vi, kia estas mia vivo, mi aldonas lastan mian versaĵon. Ĝi estas verkita post via komuna letero, kaj kiel tiu ĉi influis min al pripenso pri mia vanteco kaj la vanteco de mia vivado.

Skribu pri Sofie, se vi povas!

Kore via

Br. Kuhl.

Kafejo.

Elektra flam' rompiĝas en vitrokristalo.
Orumaj gipsornamoj kaj falsaj marmoroj,
Ĉielarkaj, blindigaj diversaj koloroj, —
Tonoj de moda valso flugas tra la halo —

Tintas glasoj — ĉampano verŝiĝas torente —
Da ebriaj spritaĵoj eksplodas raketoj —
Briliantoj, orĉenoj, perloj kaj bukedoj —
Ardaj amkomplimentoj, flustrataj sentente —

Delikate disiĝas de fumo vualo —
Al la tablo veninte kun plena pokalo,

Cu orelon „je l'sano" flustras por la bruo
Mole kaj Korsplene dumonmondulino
Kun pupilaj ordon kaj pro la atropino –
– – – – – – – – – –
Malnova amikino mia – la Bruo –

Br. Kull

Krakovo 1913.

Karto de Rimanto,

Pjotrkovo, 6 de Novembro.

Wybacz, że na Koło-Wzlocie świeciłem moją nieobecnością – mea culpa, mea culpa, mea maxima culpa! Miałem 3 dni wolne i zamiast do „hejmo" – serce (ach to serce!) zawiodło mnie do Warszawy. A za zdradę skarał mnie Najwyższy. Wróciłem z Syreniego grodu z kaszlem, katarem i błagam przebaczenia. 11go b.m. będę w Łodzi na uroczystości, którą będzie się uszczęśliwia ślubem mego brata. Nie omieszkam więc, o ile czas mi pozwoli, zobaczyć Cię, najwierniejszy z najwierniejszych.
Ryma.

Edziĝo de Prezkaŭ.

En novembro de 1913 j. en la preĝejo de Sankta-Kruco okazis edziĝa ceremonio inter

Helena Bielaniewiczówna

kaj

Antoni Herben.

[redacted]

Ostatnie pożegnanie.

Za mym pogrzebem niechże mi nie szlocha
Matuś jedyna i ojciec rodzony,
Ja wiem, że każdy szalenie kocha,
Lecz głośnym płaczem nie chcę być zbudzony.

Kto życie szedł z losem na rękę,
Z rozkoszą schodzi do ciemnej mogiły —
Skończył rachunki i doczesną mękę —
Cmentarny spokój będzie mu przemiły.

Lecz i krzywd ludzkich nie biorę ze świata,
Za serce — sercem płaciłem hojnie,
To też mnie wieko trumny nie ugniata
I bilans życia przedstawię spokojnie.

Teddy Janowski.

Lublin.

(Z teki pośmiertnej.)

Leopold Staff.

Hodiaŭ min...

Hodiaŭ min matene
De birdoj vekis krio
Kaj bril' de bona, suna oro...
Sub orboj paŝas mi
Tra rosa kamp' serena.
Sed ne sopiras jam la koro...

Ŝi ami min ne ĉesis
Je ĉiu paŝ' kaj foj'.
Forflugis sonĝa iluzio...
Ne min pasis ĝoj'
Jam ĉiom mi forgesis.
Kvankam reŝanĝe vekis ĉio...

Radias sun' la sama,
Bird' kantas dum printemp':
Sopiro estus eĉ sufiĉa,
Por reviviĝu temp'

Pasinta, kiun ama
Feliĉo plektas malfeliĉa...

Ho, Rozo! Ond' forportas
Memoron jam pri vi!
Oni forgesas – temp' ne longedaŭras!
Kiel bedaŭras mi,
Ke tiel ĉio mortas,
Ke jam eĉ vin mi ne bedaŭras...

Tradukis, dediĉante al Stefanjo M.
Julian Tuwim.

"Pola Esperantisto", Novembro 1913.

Karto al Leska.

Łódź, 18 Novembro.

Amata Leska!

Ne forgesu, ke por la difinita tago la Kroniko — mia mirbela, porĉasta idino — jam sin ornamas per plej logaj ĉarmoj virginaj, transspire atendante la horon, kiam ŝi, en brakoj de la du de l' Muzaj amatoj — — dronos en flamaj amĝuoj...

Faff.

Letero de Leska al Nestoro.

Varsovio, 18 Novembro.

Kara doktoro!

Kun granda plezuro mi ricevis vian karton, kaj ankoraŭ kun pli granda ĝojo mi eksciis, ke vi denove kun fortigita energio agadas sur la kampo de nia afero. Eksciinte, ke vi ĉe tradukas bohemajn poetojn, mia vizaĝo ekradiis pro raro kaj mi esperas ilin legi ankoraŭ antaŭ la presigo. Ĝenerale, kiam vi nur skribis al mi, ke vi estas laciĝita aŭ senentuziasmigita por Esperanto, mi ĉiam bedaŭris, ĉar simila al vi persono, kiam foriras el la kampo de l' batalo, estas post ŝi ian

malplenon, kiun ne tuj oni povas anstataŭigi per io nova. Laŭ mia ĝisnuna ekkono vin, vi apartenas al tiuj, kiuj unufoje fordonante sian animon al ia ajn ideo, fariĝas ĝia adepto porĉiam; de tempo al tempo venas ia momento de ribeliĝo kontraŭ tiu sklaveco, kontraŭ tiu io, kio ekkaptis lokon en via koro, sed ĝi baldaŭ foriĝas kaj vi denove agas. Ĉiu homo posedas siajn proprajn aferojn en pli aŭ malpli granda grado, ĉiu estas okupita per siaj propraj vivzorgoj, se li posedas familion, zorgas ankoraŭ pli multe pri ĝi. — Tamen ĉiu homo ankaŭ krom tiuj propraj kaj familiaj devoj, bezonas almenaŭ pri io ajn okupiĝadi, devas pri io interesiĝi, alie, li devas plenigi tiun truon, kiun ĉiu el ni posedas en vivo, malgraŭ niaj profesiaj, familiaj kaj ĉiuj aliaj okupoj.

Vi tiun truon plenigis per Esperanto, fordonis al ĝi tutan liberan tempon kiu al vi restas kaj, apartenante al karakteroj, kiuj ne ŝanĝas siajn opiniojn unufoje akceptitajn — restas ĝia adepto porĉiam.

Nun afero nur miniĝas min, pardonu se mi ĝin sincere esprimas, laŭ miaj propraj kelkaj esprimoj mi pensas, ke vi volis havi iom materialan profiton

de viaj ĝisnun aperintaj libroj. Vi ja tre bone konas la statom de nuna via afero, vi ja scias, ke ni konsistas preskaŭ el lernantoj kiuj bezonas la lernolibrojn, ne poeziojn, tial vi ne devas malesperi, se la libroj ne estas tiel rapide elaĉetataj, kiel vi volus.

Se vi ĉe esperas, ke el la kvanto de aĉetitaj libroj vi povas pri famo, vi ankaŭ eraris. Oni devas ĉiam rigardi nur kvaliton, neniam la nombron de aperintaj libroj. Ne koleru, kara amiko, ke mi suspektas vin pri monavideco, mi scias, ke Esperanto ofte estas ĉe multekosta kaj vi materialisto ne estas, sekve profitojn materialajn vi ne celis akiri eldonante viajn verkojn. Gloron kaj famon vi jam posedas, ĉu ne tian, kian vi esperis, sed por komenco ĝi devas sufiĉi, kun tempo ĝi ĉiam kreskados kaj vi kun viaj libroj trairos historion.

Niaj estontuloj, se Esperanto iam venkos, scios kaj memoros pri vi. Ĉu ĉe lernos verkadi laŭ tiuj viaj esperantaj versaĵoj – ĉu tio ne donas al vi plenan satisfakcion? Vi estas senkompenigata, ke vi ĉe famon ne celis, sed, pardonu ankoraŭ foje mian sincerecon, ĉiu homo en vivo almenaŭ iom estas egoisto; – unu volas plaĉi per sia ekstera aspekto, dua volas

ekstari pli supre ol alia en socio, alia volas direktiĝi ĉies atenton je siaj poezioj kaj ĉiu afte aparte kovras tion per farita modesteco.

Sed mi, la simpla popolo, ne rigardas la flankon de privata pensmaniero de iu famulo, ĉu li estas, aŭ ne, egoisto, ĉu li kontentiĝas aŭ ne per farita de si bono en nia literaturo. Al mi sufiĉas, ke tiuj kaj tiuj libroj al mi plaĉas, mi vidas ĉiujn ĝiajn belajn flankojn kaj mi ĝojas pro ĝia apero.

Vi do kreu kaj kreu plej multe porbono de nia literaturo ne desperante, se la libroj ne bone „iras", kiel diras la libristo, kaj ne timu, se ili donas ĝis nun neniun profiton. Multaj ilin komprenas, kaj legas, tio por komenco devas sufiĉi kaj tio estas jam tre multe.

Vi volus scii kiaj estas miaj rilatoj al varsoviaj esperantistoj, nu, neniun mi povas pri tio sciigi. Ĝenerale dum somero mi nek unu fojon vizitis la societon kaj en la urbo mem malbone estas, ne brilas nia verda stelo, surde estas, sur stratoj kaj en gastejoj nek unu vorton oni aŭdas pri Esperanto. Mi malgraŭ mia nuna tro okupiteco en kuranta semajno

vizitos la societon kaj proksimiĝos al personaj samideanoj; ĝis nun mi estas simila esperantisto kiel antaŭe, same kiel vi, jam ne estas tia entuziasmulo, tamen mi ne forgesas pri la ideo kaj mallaŭte diros ĉe en vian orelon, ke mi rekomendis skribi versaĵojn, ĉar tro mi vivis per rememoroj, kio estis metodon antaŭzigno. Tiu al mi skribis, ke kiam longe oni revas, iluzias – tiam longe oni kreas, kiam komenciĝas la rememoroj, finiĝas la kreado.

Mi do intencas denove skribi al mi mem iom da tempo, forgesi pri ĉio, labori por Esperanto kaj kreadi kion diktas inspiro.

Pri mia neesperantista okupo mi skribos al vi alian fojon plivaste.

Dume mi kore premas vian manon.

Ĉiam la sama
Eska.

Fuŝfaritaj legendoj pri Fajfo okaze de lia naskiĝofesto.

I

En granda urb' fumplena,
Sub de l' patrin' flugilo,
Pasis junec' serena
Al Fajf' - Johana filo.

Elkaresita frue,
Ĝuante liberecon,
Ĝisvivis Fajf' sentime
La plenan maturecon.

Oranĝerian floron
Nun via Fajf' similas,
Floran havas koron,
Vizaĝ' pro ĉarmo brilas.

Ne unu jam knabino
Je lia am' sopiras,

Sed li kun la obstino, —
„Mi kraĉas ilin" — diras.

Kaj tamen en la amo
Ne estas li laiko,
Nur lia vivomamo
Solestas — puŝkroniko.

II.

Pri laŭroj ekrevis nia Pajf'
Kaj diris al si forte:
„Se ne aplaŭdos min baldaŭ mond' —
Mi min vundigos morte.

Mi direktigi devas je mi
De l'tuta mond' okulojn
Kaj suprenlevi min devas fam'
Alten, ĉielnebulojn."

Kaj longe meditis mia Pajf'
Kaj venis al konkludo,
Ke solvimedo estos je glor' —
de l' historio studo.

Ekĝojis do forte mia Pajf',
Ekĝojis mondpubliko,
Ĉar por feliĉo de l' tuthomar'
Naskiĝis — fuŝkroniko.

III.

Krom ĝi nenion Pajfo
Nun en la vivo vidas.
Kaj kiel eble frue
Finfuŝi ĝin avidas.

Kroniko lulas Pajfon,
Karesas, iluzias —
Kaj ekster fuŝkroniko,
Li pri nenio scias.

Ĝi estas viv' de l' Fajfo.
    Ĝi estas lia „ĉio",
Ne provu ĝin imiti, –
    Li mortus pro envio.

Kunulon havas Fajfo,
    Li estis Koramiko,
Sed lin anstataŭigis
    per sia – fuŝkroniko.

Ho, ĝoju, ĝoju Fajfo,
    Idea fanatiko!
Kaj kresku, vivu, floru
    Konstante – fuŝ-kroniko!

En Varsovio, 24 de Novembro 1913.
de fuŝrimanta
Eska.

Karto de Simono.

Bruxelles, 28 de Novembro.

Drodzy moi!

Jutro już rozpoczynam właściwą wędrówkę „za dużą wodę". Tymczasem, mając czas, objeżdżam Europę. Berlin bardzo nam się podobał. Dziś z Antwerpji przyjechaliśmy na dzień do Brukseli, aby wieczorem wrócić do portu z powrotem. Wkrótce napiszę obszernie.

Pozdrów odemnie siostrę, Stacha jak też i jego osobiście, a odemnie przyjm serdeczny uścisk dłoni.

Synek.

Letero de Ĉesko.

Varsovio, sendate.

Amata Paĉjo!

Nur hieraŭ vespere, revenante hejmen el mia oficejo, durmvoje mi rememoris, ke la sekvantan tagon estos via naskiĝofesto.

Mi elektemis pro koloro je simian pro simile fojesemo; ĉu la notlibro mi iam jam skribis per grandaj literoj tiun tagon. Bedaŭrinde ĉio pereas sian finon, simile ankaŭ tiu notlibro alvenis kaj kun ĝi lasta paĝo

enŝoviĝis en la notizo. Feliĉe, ke tiu festo jus okazis la 25an, alie ni neniam eltirus tiujn fuŝfaritajn legendojn pri ni mem. Revenante el Praga, kiel mi unue elektre instalis novkonstruitan domon, mi kun agrablo konstatis, ke morgaŭ, t.e. la 25an, mi ricevos mian semajnan salajron; enpensiĝinte pri la morgaŭa festa vespermanĝo, mi subite rememoris, ke ni jam estis kun malpacienco devas atendi de mi leteron.

Mi plirapidigis miajn paŝojn, por kiel eble plej frue troviĝi hejme kaj tirante mi jam komencis serĉadon de l' temo laŭ kiu plej solene mi povus transdoni miajn al vi gratulojn! Jen, hore! venante hejmen, tuj min vokis. Anoncante kaj malgraŭ mia rigardo kaj neinteresiĝado pri liaj diversaj sciigoj, homo tiu ne sentis sin en devo elverŝigi min da sia ĉeesto kaj dum longe estis malbone vidata gasto.

Ne povante ĝisatendi momanton liberan, mi kaptis la krajonon kaj respondante je liaj diversaj demandoj samtempe mi skribis al vi tiujn legendojn, kiuj nepre devis esti fuŝfaritaj, kiel elvidintajn la vesperan lumon tro frue kaj kun malhelaj neskriĝitaj.

Bonvolu do grandanime pardoni, se ili ne kontentigis

vin, mi ĉi tie estas senkulpa kaj por estonte promesas plejsolene riparoĝi. Eble per nova jaro mi denove kun ĉio elvoniĝos.

Ĉe mi nenio nova; mi plue elektre ornamadas diversajn domojn en Varsovio kaj vespere lernas, kio kune forrabas al mi 14 horojn ĉiutage.

Ĉe l' similaj laboroj malfacile iras kaj seninteresa mia korespondado, sed kion fari!

Antaŭ nelonge dum kelkaj tagoj vizitis nian hejmon Simono; li gajnis je ĉevaloj multe da mono kaj jam forveturiĝis.

Post iu tempo mi denove renkontiĝos en Nova Mondo.

Skribis al mi ankaŭ Nestor; kiam mi respondos al li, do mi sendos la leteron por la Kroniko.

Ĉu vi ne povus viziti min dum iuj du festoj, kiuj baldaŭ okazos?

La du poŝtkartojn kaj fine fotografaĵojn kun via pura papero mi ricevis!

Dankas vin koredankes por ĉio.

Via

Eska.

Letero de Rimando.

Piotrków. 26 Novembro.

Wielmożny

Pan Pajzer-Gwizdalski

w Łodzi.

Jak Ci się podoba początek listu. Ślicznie, widzisz, ten nasz kochany Piotrków ma to w sobie, że mieszkańcy jego uważają, iż każdy szanujący się człowiek powinien mieć coś z przodu albo z tyłu nazwiska. Rozumie się, że prawo to nie powinno się rozciągać na Łódź, a tembardziej na Ciebie niegodnego, ale ... los Ci sprzyja.

ponieważ w naznaczonym terminie nie nauczyłem się esperanto jak „Sinjoro Grabowski mówi", —

ponieważ na Twoje zaproszenie na Zloto-Wzlot odpowiedziałem zdradą, i to jeszcze dla przedstawicielki słabszej połowy ludzkości, —

ponieważ jako mieszczanin zaniedbuję Cię i prawie zupełnie „interrompigis la korespondadon" —

czuję się winnym i aby ubłagać mojego mego ucznia i pana, dałem mu taki ozdobnik przy nazwisku, który niech Mu służy na długie lata, a zarówno pokuto-wałem naprawdę, nie w ciągu miesiąca, nauczę się

plue paroli esperanto.

Zadrżyj mój nauczycielu: zapisałem się na Kursa, które prowadzi tutej Birdo (mówiąc nawiasem – świetny nauczyciel) i przeniesie mnie pod swoje opiekuńcze skrzydło i ... jak będę następnym razem w Łodzi, to będę mówił, mówił i mówił do Ciebie po esperancku, że Ci uszy zaboli.

Nawet teraz już mi Ciebie żal.

Na zakończenie mego listu oświadczam Ci, że w korespondencji z Tobą innego języka jak esperanto nie rozumiem, proszę zatem pisać dalsze listy po esperancku a ja będę odpowiadał jeszcze większemi. Dobrze?

Tylko bój się Boga, listy Twoje pisz albo na maszynie, albo trochę wyraźniej, bo znając moją ciekawość możesz wyobrazić sobie męki jakie cierpię, nie mogąc odcyfrować Twoich hieroglifów. A zatem czekam na odpowiedź!

J.R.

Por patrino kulkoran mankison.

Letero de Nestoro al Estra.

Pardubice, 22 de Novembro.

Kara Samideano!

Antaŭ ĉio mi volas rektigi vian opinion pri mia „mon-amo". Ĉu ĉar mi skribas tiel malbonan esperanton, ke oni ĝin jam ne komprenas? Ĉu ĉar vi jam tute forgesis „vian belsonan kaj koran" lingvon, kaj ne komprenas jam la plej simplajn frazojn?

La afero estas tiel simpla. La eldono de miaj „Aŭtunaj floroj" kaŭzis al mi elspezojn de 160 K, ne kalkulante postajn elspezojn. Ĝis nun mi ricevis nur kelkajn 30 K, restas do deficito de 130 K. Kio do estas pli natura, ol atendi, ĝis kiam la deficito malgrandiĝos, kaj nur tiam eldoni novan kolekton „Bohemaj Granatoj". Mi tute ne volas riĉiĝi, ĉe ne ricevi mian tutan elspezon, sed tiel multe perdi mi ankaŭ ne volas. Vi devas pripensi, ke Esperanto krom tio-ĉi kaŭzas al mi (kiel al ĉiuj pli viglaj esperantistoj) multajn elspezojn. Mi posedas jam tre belan esperantan bibliotekon, mi abonas kelkajn esp. gazetojn, mi ~~parole~~ faras paroladojn en miaj najbaraj kluboj kaj ĉio tio kaŭzas kaŭzas ĉiam kaj ĉiam elspezojn. Se monama mi ne estas, mi

estas male en ĉi tiu direkto tre facilanima. Kaj ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en mia privata profesio. Sed sufiĉe jam pri ĉi tiu mona afero!

Atendante ke vi ankaŭ foje informos min pli profunde pri la stato de via afero en Varsovio, mi raportos min al Vi pri la stato de nia en orienta Bohemio.

Pri Pardubice mi ne skribos, ĉar mi opinias, ke mi ĉi tion jam al Vi skribis, sed pri niaj najbaraj kluboj.

Plej interesa estas ~~nia~~ afero en nia najbara urbo Chrudim (16000 loĝantoj). Tie la movado estas pli malnova ol en Pardubice, sed ĝi tie de la komenco mortaĉas. Kaŭzo de ĉi tiu malrapida putrado estas, ke nian aferon tie ĝis lastaj tagoj gvidis tre neserioza homo, instruisto, sed malgraŭ tio, efektiva frenezulo. Lia freneze agado kaŭzis, ke nia afero fariĝis en Chrudim tiel ridinda kaj tiel malforta, ke ne estis jam dubo, ke ĝi tute mortaĉos. Sed feliĉe nia afero naskiĝis dum favora stela konstelacio. Nenio povis pli favora okazi, ol tio, ke oni kreis ankaŭ Idon. Por ni ne estis eble forigi el niaj vicoj ĉi tiun neserioza homon, ĉi tiun frenezulon, ĉar li estas krom tio efektiva naivulo kaj bonulo. Nun li mem foriĝis. Li komencis pripensadi pri la malbona

stato de mia afero en Chrudim, kaj konsultiĝis, ke nenio alie al mi helpas, ol ĉiuj miaj „ij, oj, ej kaj aj”. Li lernas jam diligente Idon, li komencas eĉ jam ridindigi la idistan movadon, sed mia afero gaje renver-kiĝas, ĉar ĝi troviĝas nun en manoj de homo tre serioza kaj krom tio tre grava.

Kaj tio ĉi kio okazis en Chrudim, okazas laŭ mia opinio en tuta mondo.

En miajn vicojn ensoviĝis multaj duonfrenezaj homoj. Tamen la samo okazis ne nur al esperanta movado, sed ankaŭ al aliaj ideaj movadoj (libera penso, virina movado k.t.p.) sed neniu el ĉiuj movadoj estas tiel feliĉa kiel l'esperanto, ĉar neniu havas sian Idon. Oni ne volas komprenebla diri, ke ĉiuj idistoj estas frenezuloj. Ho tute ne! Sed Ido estas por nia movado ~~ia~~ kvazaŭ puriĝilo, ĉar ĝi deligas, ke ĉiuj niaj patologiaj elementoj regule forlasu nian korpon, nian movadon. Simila afero okazis antaŭ nelonge en Praha. Tie ankaŭ juna, tre vigla kaj superfervora esperantisto (S-ro Chaloupecky, gvidanto de „La Kulturo” subite fariĝis idisto. Laŭ mia opinio lia malapero estas ankaŭ kaŭzo de pli-boniĝo de nia movado (speciale en laboristaj rondoj),

ĉar liaj konduto kaj agadmaniero estis ankaŭ preskaŭ abnormalaj. Nur mi mem diras, ke mi estas ankaŭ abnormala. Mi estas ankaŭ tre vigla, mi paroladas, mi skribas artikolojn, mi eĉ verkas poemojn — kio do mankas ankoraŭ? Tre feliĉe oni min ankoraŭ prenas tute serioze. Se mi ankaŭ foje idistiĝos, tiam sciu, ke mi tute freneziĝis. Kore salutas Vin Via

Dokt. Schulhof.

Letero de Leska al Nestoro.

Varsovio, decembro.

Kara amiko!

Errare humanum est — kaj tial bonvolu pardoni mian neĝustan esprimon koncerne tiun malkompreniĝon. Mi bone ne memoras, sed ŝajnas, ke tiel klare mi min ne esprimis, ĉar tro bone mi ja konas Vin por ke ekpensi eĉ pri io simila. Efektive okazis negranda malkompreno, sed ĉitie ne estas kulpa „nia fleksebla kaj belsona lingvo". Mi preta estas preni tutan ~~puton~~ kulpon je mi mem, nur bonvolu ne preni tiun suferanton, tiun viktimon de diversaj nenombreblaj lingvoj, kias estas nia Esperanto. Mi, kiu pardonis

al ĝi kelkajn jarojn de mia vivo, mi, kiu ankoraŭ ĝis nun estas stelaro ĝia, mi, kiu preta estas dediĉi kun ĉiu, kiu estas ĝia malamiko, mi, kiu preta estas fordoni mian vivon pro ĝia ĝenerala akcepto — per preĝantaj vortoj donas min al vi, kiu en via indulgemo kaj pardonemo kaj boneco estas „nekomprenebla", ke vi bonvolu ne plu koleri je nia lingvo. Vi tro multe amas ĝin, tro multe ĝia ideo plenas en via sango kaj tial mi esperas, ke vi jam forgesis pri la malagrablaĵo, kiu tuŝis vian ambicion, kaj jam repaciĝis kun ĝi.

Kara amiko! Jam, ho, kie estas tiuj tempoj — mi malsana estus, se almenaŭ unu fojon en semajno mi ne vizitus esperantistan societon. Multfoje, kiam mi studadis eksterlande, ne timante malvarmon, ofte en botoj kun truoj, malgraŭ la malvarmo aŭ koto, mi kun korbatanta koro marŝis kunvenejon. Multfoje la lastan kronon mi pagis en kafejo, sed ĉeesti la kunvenon mi devis. Nun, ho, bedaŭrinde, mi neniam povas malbonigitajn horojn, la kunvenoj okazas en privata loĝejo, mi ne bezonas diri, ke mankas al mi krono por kafejo. Tamen samaniere fariĝas, ke dum dek monatoj nur dufoje mi vizitis la societon, de tago al tago mi prokrastas

fariĝi ĝia ano kaj, loĝante en Romo, mi nek unu foje ankoraŭ vizitis la Papon.

Unufoje, mi bone memoras, vizitis min Belski kaj, vojaĝante tra Varsovio, mi okaze troviĝis sur Dzika-gass. En unu momento, ne pripensinte eĉ, ĉu mi havas agon, mi eniris en la domon, kiu signita estas per N° 9a kun la intenco, viziti la Papon. Tuj, ke tiu strato troviĝas en centro de la varsovia Ghetto kaj mi, serĉante en pordego sur listo de loĝantoj ilian nomon, kun granda miro trovis en rusa kaj pola lingvoj: Lejzor Zamenhof. Tiu nomo forprenis al mi la kuraĝon kaj mi rezignis je vizitado tuj.

Mi estas progresema homo, liberpensulo, ĉi en fundo de mia koro ardas ankoraŭ ideo de socialismo – bonvolu do skribi al mi, ke mi estas ~~Sionisto~~ fanatikulo religia, ke mi estas Sionisto, ke fine mi estas .... nur pro delikateco mi ne citas la vorton. Bonvolu skribi al mi ĉion ĉi tion, mi volonte ĝin legos. Mi ruĝiĝos pro honto kaj aŭdinte admonon de vi, mi eble komprenos mian grandan kulpon kaj ankoraŭ en embrio penos ĝin sufoki.

Mi petas vin, elverŝu sur mian kapon tiun malbenon

akvon en formo de admonoj, alie mi estos perdita — tamen neniaokaze mi idiotiĝos.

Pro tio mi efektive devus, kiel la aliaj, franciĝi. Kaj tion mi ne intencas fari.

Via lasta letero estis tre interesa, mi kun agrableco tralegis ĝin kelkfoje kaj admiris la spritajn kaj ĝustajn karakterizojn de viaj diversaj samideanoj.

Vi deziras, ke ĉiun mian al vi leteron mi plenigu per diversaj priskriboj pri mi mem, sed kiel vi scias jam, nun mi ne vizitas delonge la societon. Tial mi ne povas pri ĝi iom ajn sciigi al vi.

Sed se foje mi ree enfalos tien, mi konatigos vin kun ĉiuj famaj varsoviaj gravuloj, mi priskribos precizemon de S-ro Antonio, francemon de A. B. Bzdukowski, modestecon de Günther, literaturemon de S-ro Kabe k. t. p.

Dume mi kore salutas vin.

Via Leska.

Sinjoro „inĝeniero" Rimanto.

Karto de Leska.

Varsovio, 11 de Decembro.

Pasigante la unuan festotagon hejme kaj aŭskultante la koncertojn de nia kara artisto de l'arĉo, ni komune sendas al vi niajn sopirojn.

Leska

Baĉo. Damiano.

Far-Toro.

Karto de Limono.

„Lapland", 7 dec., dimanĉo.

Kochany Fajfie!

Jestem już u brzegów Ameryki. Jutro rano mamy wylądować. Podróż minęła bardzo przyjemnie. Nic nie wiem o tak zwanej morskiej chorobie. Jednakże chorych było wogóle bardzo dużo. Humor „esperancki" (można czytać: desperacki) dopisuje mi stale. Z New-Yorku jadę dalej na Zachód. Uściśnij Stacha i pozdrów odemnie siostrę jego i matkę.

Odemnie przyjmij uścisk dłoni i przyjacielskie pozdrowienie.

Synek.

Karto de Luka. 7

Varsovio, 17 decembro 1913.

Amata Fajfo!

Ŝajnas, ke lastfoje mi ricevis de vi karton, kiun ĝis nun mi ne respondis. Malsaĝan minon mi havas konfesante tion, sed kion fari! restas fakto, kiun mi neniamaniere povas klarigi.

Imagu, ke por la venantaj Ŝerlokegoj verŝajne mi restos

en Varsovio, ĉar neatenditaj cirkonstancoj tien vokis kaj kontraŭ tiuj ni ofte restas senfortaj.

Ne tre agrable mi tion faras, sed mi tamen devas.

Restu sana.

Via Ĉesko.

Kristnaskaj salutojn sendintaj estis al sekvantaj amikaj kaj samideanoj:

Simono en Chicago,
Nestoro en Pordakice,
Mecenato en Kalisz,
Borotko en Wien kaj
Sanchez de Armas en Valencia.

Subskribis:

Ĉesko kaj Gajfanto, Brunulo, Brunoza, Tadzo kaj Nana kaj ilia patrino.

La 25ªⁿ de Decembro 1913

en Brunejo.

Letero de Sanchez de Armas al Brunora.

Valencia, 16 de Decembro.

Kara Samideanino:

Vian tre belan kaj afablan karton mi ricevis kun vera plezuro kaj danko. Mi tre dankas vin pro via bonvoleco akceptinte mian korespondadon, kaj ankaŭ pro viaj tro amindaj vortoj rilate al mia kono de la lingvo Esperanto; kaj precize pri tiu punkto mi ankaŭ devas vin gratuli, ĉar vi skribas nian karan lingvon tute korekte kaj fundamente. Kaj (parolante pri la samo) en vi estas pli da merito ol en mi, ĉar vi nur estas esperantistino de du jaroj kaj mi estas esperantisto de la jaro 1906a.

Mi ankaŭ dankas al vi la sciigojn pri via persono; per ili mi vidas, ke vi estas juna, tre juna, eĉ pli juna, hove! ol mi, kvankam vi ne kredu ke mi estas tre maljuna; tute ne, mi estas 23 jara. Komprenelle mi ankoraŭ estas fraŭlo kaj mia tuta familio konsistas el mia patro kaj unu fratino, du jaroj malpli aĝa ol mi; mia amegata patrino (Dio ŝin havu en Sia gloro) mortis dum la jaro 1901; ankaŭ mi havis tri fratojn, pli aĝajn ol mi, kiuj mortis, kiam ili estis infanoj.

Profesie mi estas Helpisto de Ĥemia Inĝeniero (hispane: Perito Químico-Industrial) kaj mi finis miajn studojn dum Junio de la jus pasinta jaro. Mi ankoraŭ ne laboras, ĉar ĉi tie ne estas facile trovi okupon, kvankam mi ĝin serĉas kaj esperas fine sukcesi.

Alia studo, kiu al mi treege plaĉas estas tiu de la fremdaj lingvoj; mi jam lernis la francan kaj anglan. estas lernante la italan kaj germanan kaj lernos (kiel lasta) la portugalan; kiu por mi, hispano, estas vere facila. Nenecese estas diri ke mi ne lernas ĉi-tiujn lingvojn perfekte kaj profunde; mia deziro estas nur ilin koni sufiĉe por povi ilin legi kaj traduki principe korekte; unu escepton mi faris kaj estas tiu de la angla lingvo, kies estas tiel ĉarma, tiel simpla en tio, kio estas la animo de la lingvoj (la verboj) kaj kiu tenas tiom da similaĵoj (en ĝia gramatiko) kun nia kara Esperanto, ke mi decidis ĝin tute kaj perfekte lerni, kaj tial, kvankam mi ĝin lernis dum du jaroj kun bonega profesoro, mi nun sola daŭras ĝin lernante. Ĝis kiam mi atingos ĝian plenan scion.

Kaj nun iometon pri nia Esperanto: kiel antaŭe dirite mi estas esperantisto de la jaro 1906; en la jaro

1907 mi ekis korespondadi kun fremdaj gesamideanoj. Kaj komprenebla fakto en ĉiu unua entuziasmo, mi estus dezirinta korespondadi kun ĉiuj gesamideanoj el la mondo kaj atingis la nombron da 111 gekorespondantoj; nuntempe mi havas multajn malpli, nur 22 kaj tiuj estas la plej nova, kvankam unu el la plej karaj kaj estimataj! La esperanta movado en Hispanujo estas sufiĉe bona; tamen ĝi iras malrapide. En Valencia estas grupo esperantista (kies ano mi estas) kun pli ol 100 geanoj, kaj oni publikigas esperantan jurnalon titolita "La Suno Hispana", kiun mi abonas. Mi ankaŭ estas membro de U.E.A., tiu bonega kaj plej praktika esperantista organizaĵo, kaj abonas ĝian oficialan organon "Esperanto". Fine, mi estas konvinkita kaj entuziasma esperantisto, kaj mia konvinko estas ĉiutage pli firma pri la fina triumfo de de mia afero kaj mia entuziasmo kreskas de tago al tago al tiu bela programo de Paco kaj Amo, kiun simbolas tiu ĉi ~~bela~~ vorto: Esperantismo.

Vi petis ke mi skribu al vi pri vaste kaj mi kredas ke mi plenumis vian peton, ĉu ne vere? Kaj kun grande plezuro, mi aldonas.

Mi finas ĉar mankas al mi papero kaj eble mi kapdoloriĝis nun per tiom da babilado. Akceptu plej respektajn kaj tutkorajn salutojn de via hispana samideano,

Manuel Sanchez de Armas.

Letero de Brunoza al Sanchez de Armas.

Łódź, 21 de Decembro.

Kara Samideano!

Kun granda plezuro mi ricevis hodiaŭ Viajn leterojn kaj kartojn kaj kiel pruvon de la dankemo, mi tuj respondas al Vi.

Laŭ via afabla letero mi vidas, ke nia korespondado promesas esti interesa kaj amika, mi supozas ankaŭ, ke ne estos ankaŭ granda malkonvenaĵo, se mi unue sendos al vi mian fotografaĵon en kio vi certe ne restos ŝulda. Same juste, mi ŝarĝas vin per mallonga aŭtobiografio.

Same kiel Vi, mi ankaŭ estas duonorfo: en 1904 jaro mi perdis la patron. Li estis dependanto ĉe notario; en frua aĝo perdinte la patron, li devis preskaŭ kiel junulo labori je sia vivteno kaj ankaŭ

helpi al la familio. Pro tiu kaŭzo li ne povis ricevi pli altan klerecon kaj se li estis tre inteligenta, tiam li dankis sole nur al memlernado per kiu li sen-igadis sin de libera tempo.

En tute similaj cirkonstancoj restis mi post la morto de mia patro: mia plejaĝa frato havis tiam 13 jarojn, ni do ĉiuj estis infanoj. Ni estas kvar: du fratoj kaj du fratinoj, mi estas dua laŭ la aĝo. Ni vivas kune kun la patrino kaj miaj fratoj kaj mi laboras, sole nur la plejjuna fratino ankoraŭ estas en lernejo.

Mia plejaĝa frato Stanislav (en via aĝo), estas libro-tenanto en sama kontoro kie mi laboras. Antaŭ kvar jaroj li finis gimnazion en via naskurbo Częstochowa (Ĉenstoĥovo) kaj depost tiu tempo li estas en Lodz kie ni ĉiuj ankaŭ nun troviĝas. Mia frato estas tre bona esperantisto (de jaro 1904), kaj siatempe multe okupiĝis pri propagando.

Pri mi, vi jam scias, do nun mi skribos pri mia dua frato Tadeusz (Tadeo). Li havas 18 jarojn, estas komizo kaj de kelkaj monatoj ankaŭ loĝas kun ni (antaŭe li loĝis en alia urbo). Li ankaŭ estas esperantisto.

plejjuna fratino nomiĝas: Janina (Johanino), ŝi havas 13 jarojn kaj estas lernantino de dua klaso en virina gimnazio. Ankaŭ estonta esperantistino.

Mia frato Stanisław havas kelkajn kolegojn, tre bonajn esperantistojn, kiuj ofte nin vizitas. Inter ili elstaras St. Karolczyk pri kiu vi eble aŭdis kiel pri poeto (Lirika – Unuaj agordoj). Mia frato estas kunaŭtoro de tiu kolekto sub pseŭdonimo Wiktor Ceski. Dua ne malpli bona esperantisto estas Włodzimierz Pfeiffer (ĝenerale inter ni nomata Fajfanto), pri kiu iam vi certe iom aŭdos.

Kiel do vi vidas, mi ne estas senigita de esperantista societo kaj tial vi certe ne miros, ke mi faris sufiĉe rapidajn progresojn.

En mia urbo estas du esperantistaj grupoj: Pola Esperantista Societo kaj Lodza Esperanto-Societo, unua pola, dua hebrea. Ni komprenble apartenas al la unua.

Vi ne havas imagon, kian klopodon kaŭzis al mi la anonciĝo en „Esperanto": ĝis nun mi ricevis preskaŭ 100 proponojn. Komprenble estas al mi tute neeble kun ĉiuj korespondi, tial mi elektis nur kelkajn, inter ili vi estas unua kaj plej senhezite elektita.

Kun koraj salutoj mi finas tiun-ĉi leteron kun malpacienco atendante respondon

Via Alicia Braun.

<u>Karlo de Simono.</u>

New-York, 16 Decembro 1913.

Kochany Fajfie! Widziałem dziś Twoją duszę, przele-tującą nad Broadway'em. Ciało Twoje prostere na łonie Europy pozdrawiam przyjaźnie. Poważny ton Twego listu, niemniej jednak fakt jego przybycia wprawiły mnie w stan osłupienia chwilowego. Od soboty pracuję, już zarabiając na skromne utrzymanie. Uściski wszystkich od

Synka.

Jaro 1914.

Novjardezira Poezio.

Ho, unuaj miaj, diinaj ĉieloj!
Mi, kiu iam kun vi vivis kune,
Nun vin petegas, ĉastaj kaj angelaj,
Kun mi pasigu momenton komune.
Super kaj unu ĉielan flugilojn
Kaj direktu al mi viajn belajn trilojn.

Posedas vi, mi scias, forton ~~magian~~ miran
Kaj tiun uzas vi por altaj celoj —
Momenton donu do al mi inspiran.
Ornamu vortojn per ~~[illegible]~~ sunaj juveloj
Ĉar mi intencas gratuli Fajfanton
Kaj al ĉi krei la novjaran kanton.

Aŭskultu! trumpetoj aŭdiĝas, tambur'!
Tra l' ondoj de l' vivo mi velis,
Ĝis nuboj, ĝis steloj, ĝis tela lazur',
Persiste, kun kredo, kun ĝojo, plezur'
Esperojn la Verdajn mi pelis.

Ekbrilis, ekflamis kvinpinta la stel',
Plihele ĵarigis en mondo, —
Ekbatis en murojn de l' vivo-mortel',
Jen estis batalo, montriĝis la cel',
L'unuajn mi vidis pacrondo!

Persisto, kuraĝo, juneca fervor'
Jen kono de ia avaro,
Sindono de juna, flamanta tutkor';
Ho, ĉiom ĉi metis mi kun la ador'
Ĉe l' ŝtupoj de l' Nova Altaro.

La jaroj pasadis ĉe l' bord' de Vistul',
Mi sur la Krakova pavimo,
Vi loĝo, en urbo de fumo, nebul'. —
Konstante, senlace, kun orda stimul'
Batalis mi ĝoje, sentime.

Hodiaŭ la oka forpasis jar' jam
De kiam nin ligis Espero.
Okuloj ne brilas per lia fortflam'
Je ĉiu objekto kun verda ornamo,
Ho, ĉu estingiĝas kratero . . .

Aŭskultu! trumpetoj aŭdiĝas, tambur'!
Tra l'ondo de l'vivo ni velis.
Ĝis nuboj, ĝis steloj, ĝis hela lazur',
persisto, kun kredo, kun ĝojo, plezur'
Esperojn la Verdajn ni pelis.

Rememorante pri antaŭaj novjardezirojn al Fajfo
verkis
Esko.
en Łódź, 1an de Januaro
1914.

Karto de Borotko al Wien.

Wien, 30 Decembro 1913.

Dankante kore por la alsenditaj Kristnaskaj bondeziroj de Lodz'aj samideanoj, mi sendas al Vi kaj ĉiuj la miajn ankoraŭ pli korajn kaj sincerajn Novjarajn.

Vivu Esperanto kaj ĝiaj Lodz'aj fidelaj partianoj.

Br. Kuhl.

Karto de Ĉeska al Brunulo.

Varsovio, 7 de Januaro 1914.

Amata Direktoro!

La frenesa penso ekkaptis min kaj subite mi ekdeziris iam ankoraŭ skribi al Vi. Antaŭ ĉio mi diros al Vi, ke la „verko" forĝas, kiam estos finita, mi ne povas diri, sed plejcerte en tiuj tagoj. Dum kelkaj vesperoj laŭvice mi estis okupita kaj neniom povis skribi. Hieraŭ mi ludis noktom unue bilardon, hodiaŭ mi akompanos Kolondon al stacidomo, revenonte nokte mi ankaŭ ne povos skribi ĉar estos tro malfrue. Bonvolu trankviligi Gajfon ĉar li certe perdas jam la paciencon. Laŭ mi, se tiu „verko" ankaŭ ligita estos por reciproka korespondado, estos pli komprenebla por estontaj studoj de

diversaj historietoj.

Via Eska.

Letero de Sanchez de Armas al Brunoza.

Valencia, 31 Decembro 1913.

Kara amikino kaj samideanino!

Mi ricevis vian tre belan karton kaj afablan leteron kune kun via portreto, kaj mi esprimas al vi miajn plej sincerajn dankojn. Ho, ne! ne estis granda malkonvenaĵo sendi al mi vian fotografaĵon. Kontraŭe, mi juĝas tion kiel tute naturan aĵon; tamen estas opinioj kaj opinioj; ekzemple: laŭ la hispana fraŭlina pensmaniero, via faro estas tute abomeninda, eĉ krimo, ĉar la hispanaj fraŭlinoj donas al la portreto gravegan kaj valoran signifon; ~~tiel~~ kaj ili pensas ke sendante ĝin, ili kvazaŭ sendas ilian propran personon; tial ili nur donas la portreton al la fianĉo. Kaj tio nur post obstinaj neoj kaj en kelkaj okazoj post kelkjara interrilato. Ne ridu kaj ne kredu ke mi trograndigas; malfeliĉe kaj generale la hispanaj virinoj ankoraŭ vivas en la mezepoka aĝo, kaj ili ne scias juste kaj ĝuste taksi la agojn kaj la aĝojn. Kaj ne

nur laŭ hispana vidpunkto la portreto havas tiel grandan valoron; kelkaj samideaninoj, precipe el amerikaj respublikoj (krom Usono) al kiuj petis la interŝanĝon de la portretoj, ĉesigis tuj la korespondadon aŭ ne respondis jese aŭ nee al mia peto. Kiel ŝajni por ĝi estu ilin ofendinta. Kaj pri la aĝo? Alia grava afero! Unu korespondantino al kiu mi demandis kiom aĝa ŝi estas, respondis, ke tiun demandon oni ne devas fari al fraŭlinoj, alia diris, ke kiam virino estas pli ol 15 jara, ŝi ne devas diri sian aĝon. Kaj fine al unu el miaj amikoj en Valencia, respondis esperantistino, ke demandi fraŭlinon pri ŝia aĝo estas signo de malcivilizeco (!?) Mi ne insistas pri ĉi tiu temo, kiun mi nur pritraktis por veni al konkludo, ke vi estas moderna virino kaj ne havas ridindajn prijuĝojn. Denove mian plej koran dankon pro via portreto, per kiu mi vidas ke vi estas bela kaj tre simpatia junulino. Ĉi-kune mi sendas mian fotografaĵon, ĉar mi ne volas resti ŝulda kaj kiel diras hispana proverbo: „Kiu pagas, ripozas".

Kun granda intereso mi legis viajn detalajn sciigojn pri via estimata familio; via patro ankaŭ laboras ĉe notario, kiel via mortinta patro. Mi ne aŭdis pri

S-o St. Korolczyk, sed jes pri postaj Leska kaj Leski, kvan-
kam mi ne legis „Unuaj agordoj", mi multe ĝojas
scii ke Wiktor Leski estas via frato Stanislav. Mi vidas
ke vi havas tre bonan kaj klaran esperantistan societon,
pro kio mi vin gratulas! Mia patro kaj fratino, bedaŭr-
inde ne scias Esperanton; mia fratino ĝin eklernis,
sed forlasis baldaŭ kaj ŝi nur scias iometon.

Mi forgesis diri en mia antaŭa letero, ke en Valencia
krom la Esperantista Grupo al kiu mi apartenas, estas
du aliaj, unu laborista kaj la alia katolika.

Nun mi rakontos al vi iom pri la Kristnasko en
mia lando. Kvankam la Kristnaska tago estas nur
unu (25 Decembro) en Hispanujo oni festas tri (25,
26 kaj 27); tiuj tagoj estas kutime pasigi en plej
intimaj familiaj kunvenoj hejme, kaj tiel kiel por
la angloj ktp. La Kristnasko (angle Christmas) estas
tago difinita por ke la Sanktaj Reĝoj (por la anglaj geinfanoj
Santa Claus) alportu al la geinfanoj la ludilojn, kiujn
tiel iluzie ili atendas. En Hispanujo la tri Reĝoj
malfruiĝas kaj alvenas la 6an de Januaro. Sed plej
interesa estas la antaŭtago de Kristnasko; dum tiu
tago posttagmeze la halaj kaj vendejoj de manĝaĵoj estas

